HUNGARA VIVO

1

972

— Ft

0,5 $

F/330

27

MEGYEI KÖNYVTÁR SALGÓTARJÁN

DUM VIA VOJAĜO EN HUNGARIO

vizitu niajn movmaterial-staciojn
En la tuta lando ni estas kompleze
je via dispono.

EKSTRA SUPER BENZINO 98.
EKSTRABENZINO 92. NORMALA BENZINO 86.
OLEOJ „MULTI GRADEN"

ÁFOR
BENZIN-OLAJ

HUNGARA VIVO

1972. XII. jaro, 1-a numero

Hungario — kiel niaj legantoj vidas 1

Dezső Kosztolányi: Anĝelo. Tr. d-ro K. *Obermayer* 2

I. Patrubány: „Grand Prix". Tr. P. *Kristek* 3

I. László: Hungaraj pioniroj de la tekniko 3

M. R. Szabó: Budapeŝto 4

Interesaĵoj 6

J. Szekeres: Panoramo 8

S. Szathmári: EMBA 10

L. Lesznai: Budapeŝto — Muzikurbo 12

L. Tárkony: Revuo de revuoj . 14

gm: Zoltán Lenkey 16

L. Benjamin: La knabo edukita de lupoj. Tr. K. *Kalocsay* . . 16

T. Újlaky—Nagy: Hungarlando gastigis la I. Ĉasistan Mondekspozicion 18

J. Mátéffy: Restaĵoj de la islama arkitekturo en Hungarlando 20

P. B.: Filmoj pri Hungarlando . 21

Siberia humuro 22

Dévai: Sveda gasto en nia librovendejo 22

Zs. Gyarmathy: Sekretoj de virinaj nomoj 24

G. Kurucz: La lernantaro, nia estonteco 24

Sz. Bálint: Tri mirakloj de Sankta Antonio 25

kvk: Niaj landaj zorgoj 26

Niaj legantoj skribas 26

Leterkesto 28

Recenzo 30

FERI: Esperanto-semajnoj en Hungario. Krucvortenigmo . 31

Korespondi deziras 32

Sur la kovrilpaĝo: Budapeŝta panoramo

Hungario—kiel niaj legantoj vidas

Redakcio de Hungara Vivo ricevas multajn leterojn de la legantoj. Nun ni publikas fragmentojn el kelkaj leteroj, sen komentario.

„Neforgeseblaj travivaĵoj. — De la 4-a ĝis la 10-a de julio 1971 mi partoprenis en Somera Esperanto-Universitato en Gyula, en vere internacia medio... Altnivelaj prelegoj, koncertoj, filmprezentado, ekskursoj. Gyula estas pitoreska ĝardenurbo. Belega termobanejo, multe da floroj, arboj... Vera estas la proverbo, kiu diras: »pol', hungaro — frata paro«. Jes. Mi povas diri tion kun mano sur la koro. Gastameco, ĝentileco, granda amikeco de komenco.

Hungario estas belega lando, Budapeŝto — neforgesebla urbo. Mi havis eblecon admiri monton Gellért, Parlamentejon, pontojn, kastelon, preĝejon de Matiaso kaj multe, multe da diversaj historiaj kaj modernaj objektoj. Ĉu en mia vivo mi ankoraŭ rigardos tiujn ĉi vidindaĵojn, mirindaĵojn. Eble? Neforgeseblaj travivaĵoj! — Boguslav Sobol, Skierniewice, Mokra Prawa 81, *Pollando.*"

„Skribante al vi mi volas esprimi mian dankon pro via tre interesa revuo. La enhavo estas ĉiam diversspeca, bone verkitaj estas la artikoloj. La artikolon „Konfeso pri la Patrio" mi legis kun vera intereso, ankaŭ la rakonton Ŝanoar.

Mi legis en svedlingva gazeto rakonton pri la ekonomia progreso en via lando, ankaŭ pri la socia sistemo, kiu nun gvidas vian landon. Mi deziras al vi feliĉon pri la atingaĵoj ĝisnunaj kaj estontecaj... — S:ro C R Lindenmo, Alb Engströmsgatan 27, S—575 00 *Eksjö Svedio.*"

„Jam semajnoj pasis, de kiam mi trovis antaŭ mia ĉambra pordo la numeron de Hungara Vivo. Mi travivis ege agrablan senton. Antaŭ mi reviviĝis la bela Hungario, kiun mi vidis en la aŭtuno de 1970. La unua aĵo, kiun mi vidis en la nokto de alveno, estis la majesta Gellért-monto. Ĝi altiris mian atenton per lumigita monumento, dominanta super la tuta ĉirkaŭaĵo, kiel lumturo. Nia ŝipo ankriĝis vidalvide al ĝi.

Dum mia restado, mi admiris tiun imponan altaĵon, kiu leviĝas kiel simbolo de la hungara spirito, kaj ĝi penetris profunde en mian animon kaj subkonscion. Ĉarma, impona estas la hungara ĉefurbo, Budapeŝto, samtempe kora kaj gastama. Trankvila, poeziplena estas la hungara stepo — „Pusta". — Ĉi tiel' animo disverŝigas, kiel antaŭ maro — sed ĝi estas tera, plena de favoro kaj fruktodonemo.

La blua Balatona lago, luliĝanta sub la aŭtuna vento, ŝajne parolis al mi: „kiom da beleco estas en la mondo! kia feliĉo povus esti, se la homaro estimus kaj amus unu la alian!"

Jen, nia komuna lingvo Esperanto malfermas la pordon de ĉi tiu edeno por mi... — Penka R. Batoeva, bul. D. Blagoev—44. Sofio —48. *Bulgario.*"

„...mi kun vera ĝojo legas vian gazeton. Unue la humuraĵon, poste pri muziko (ĉu vi ne promesis pli pri Kodály?), poste pri literaturo, kaj folkloro. Grandan intereson vekis ankaŭ d-ro Jáki per sia artikolo pri Finnlando, pri la similaĵoj de la du lingvoj. Mi estis feliĉa, ke mi partoprenis la unuan instruistan seminarion pri Esperanto en Szeged. Mi trafis multajn interesajn homojn. Plurajn el ili mi konservas en mia memoro kun ĝojo, kaj eĉ tre ofte pensas je ili... En la plenaera teatro mi vidis „Aida" kaj poste „Kisbojtár"... Nu, kompreneble mi dezirus reveni al tia belega lando, sed la kara mono... Mi sendas la plej bonajn kaj korajn salutojn el la nordo — H. Monrad Christensen, Sommersted centralskole 6560, Sommersted, *Danio.*"

Dezső Kosztolányi:

ANĜELO

Damo venis viziti min. Apenaŭ ŝi enpaŝis la ĉambron, ŝi montris siajn lakŝuojn, siajn ŝtrumpojn. Por amuzi ŝin, mi ĵetis al mia hundo pecon de sukerkubeto. Dume ŝi ekdeziris la sukerkubeton, ankaŭ ŝi petis unu kaj ŝtopis ĝin tuj en sian buŝon. Ŝi anoncis, ke ŝi tre amas la sukerkubeton, sed pleje ŝi amas la panon kun marmelado kaj la „ruĝan supon" t.e. tomatsupon. Tiu vizitantino aĝis du kaj duonon da jaroj.

Ŝia vizaĝo — kun la hirta harareto, grandegaj, bluaj okuloj, ne elformitaj, hezitaj trajtoj — estas tia, kiel la rapide skizita, artista krokizo de la naturo. Ĝiaj konturoj estas ankoraŭ nedifinitaj, sed la desegno mem belega. Mi imagis ĉiam tiaj la anĝelojn. Jam longe mi ne kontaktiĝis kun tiaj dukaj-duon-jaraj anĝeloj. Ĉiu ŝia movo, rimarko interesis min. Mi lernis multon de ŝi.

Unue, ke ŝia animo — kontraŭe al la vizaĝeto — estas jam tute preta. Tiu prahoma animo ĝi estas, kiun mi povus studi nur tiel, se mi vojaĝus sur malproksimajn insulojn, kie loĝas sovaĝaj gentoj. Tiu ĉi eta anĝelo estas mem la egoismo. La plej unua estas ŝi kaj ŝiaj havaĵoj. Poste sekvas ŝia patro kaj patrino, kaj iliaj havaĵoj. Tiom estas ŝia moralo. Sed ŝi havas ankaŭ primitivan bonecon.

Ŝia vartistino, kiu ŝin akompanis, ofendis ŝin per io. Mi levis la tranĉilon, kiu kuŝis sur la tablo kaj proponis al ŝi — kavalirece kaj amikeme — ke mi mortigos la vartistinon. Ŝi protestis kontraŭ tio. La vartistinon ne licas mortigi. Ŝin mem ne licas mortigi, nek patron, nek patrinon, nek min, eĉ mian hundon ne. Mi demandis, kiun do licas mortigi? Ŝi respondis, ke la ciganojn. Mi demandis, kial licas mortigi la ciganojn? Ŝi respondis, ke tial, ĉar „ŝi ne konas ilin". En tiu delikata motivado mi jam retrovis la moralon de la hodiaŭa „kulturita" homo, kiu la murdon rigardas krimego, dum temas pri la anoj de malvasta kolektivo, sed ĝin opinias tuj pardonebla, eĉ virta, kiam la viktimoj estas „fremdaj", kiuj apartenas al alia raso, alia klaso, nome tiaj, kiujn „ni ne konas".

Post nia mallonga ideointerŝanĝo ŝi komencis manĝi. Mi metis antaŭ ŝin tri pomojn. Ŝi prenis la unuan en la dekstran manon kaj ĝin manĝetis, la duan ŝi tenis en la maldekstra, ke iu ĝin dume ne forprenu de ŝi, la trian ŝi metis en sian sinon kaj strabis konstante ale al ĝi. Ŝi timis, ke la apetito venkos ŝin. Je sia feliĉo ŝi sukcesis enstomakigi ĉiujn tri. Tiam ŝi eksnufis malpeziĝinte.

Mi enkondukis ŝin en la banĉambron, ke mi lavu ŝiajn manojn. Tie ŝi ekvidis etan, violkoloran sapon. Ŝi deklaris, ke ŝi portos ĝin hejmen. Mi donis ĝin al ŝi. Sed ŝi rimarkis ankaŭ rozkoloran kaj blankan sapojn. Ŝi persistis ĉe tiu intenco, ke ŝi portos hejmen ankaŭ tiujn, ĉar — kiel ŝi rimarkigis — „ŝi bezonas multon". Mi aprecis ŝiajn vidpunktojn. Sed ŝi ne trankvilis, ĝis kiam ŝi havigis al si paperon de mi, kaj ĉiom ŝi enpakigis, ĉirkaŭligigis per ŝnureto. Dum mi okupiĝis pri ĉi tio, mi meditis pri tio, kiel do fanatikaj homfeliĉigantoj povas fundamenti socion laŭ tia teorio, el kiu la tre homan instinkton de la posedado ili tute ellasas. La unua frazo de la eta homo estas: „Donu al mi"... Mi timas, ke ankaŭ la lasta frazo de la grandaj homoj estas sama. Mi serĉis por ŝi ludilon. Bedaŭrinde, ĉe mi jam longe ne troviĝas tia aĵo. De pluraj jardekoj mi ludas ekskluzive per papero kaj plumo, per sentoj kaj pensoj. En la spegulŝranko mi retrovis la fakon de butonoj. Ĝian enhavon mi ŝutis antaŭ ŝin sur la tapiŝon. Tiuj estis butonoj por viroj kaj virinoj, ostaj, ŝtalaj, fadenaj, perlamotaj butonoj. Ŝi havis abunde da ili. Subite ekscito ŝin atakis. Ŝi leviĝis, petis min, ke ankaŭ la butonojn mi enpaku apud la sapojn, ŝi devas urĝe hejmeniri.

Nun mi, uzante mian tutan argumentadan kapablon kaj elokventon, klopodis paroli al ŝia animo, kiel barbare estas lasi poeton kaj lian familion sen butonoj, butonojn ankaŭ ni bezonas ja, por mia edzino, por la filo, por mi mem, eĉ por mia povra hundo. Mi konfidis al ŝia grandanimeco, ke ŝi decidu laŭ sia lojaleco. Ŝi nur gapis min mire per la pura anĝelvizaĝeto, misteraj, bluaj okuloj. Ŝi loksidiĝis inter siajn butonojn, longe serĉadis, poste ŝi levis rustan, rompitan pantalonbutonon, ne estis tie eĉ unu pli malbela, pli malgranda, kaj ŝi prezentis ĝin al mi.

Ŝi fanfaronis kun radia vizaĝo al sia vartistino, ke ŝi donis al mi butonon. Pri tio, ke ŝi ricevis ja cent naŭdek naŭ, ŝi silentis. Tiam mi tuj komprenis la historion de la homaro. Vidinte ĵus la praprocedon de la havaĵakirado, en malgrandigita, sed reala formo, nun mi povis al mi klarigi, kia estas tiu altruisma nobleco, kiu indulge bonfaras al mizeruloj.

Mi varme ŝin dankis por ŝia nobla korfavoreco, poste emociiĝinte mi kisis survange tiun etan bonfareman anĝelon.

Tr: d-ro Klára Obermayer

„GRAND PRIX”

por la evoluigo

de pasaĝera komforto

kaj sekureco

En la Internacia Aŭtobusa Semajno, aranĝita en Montekarlo, estis montrataj la plej luksaj aŭtobusoj de Eŭropo, ekz-e la francaj Berliet, Citroën, Savien, Mercedes-Benz-France, Magirus-Deutz-France, la itala Fiat, la germana Kässbohrer, la svedaj Volvo kaj Scania-Bussar, la aŭstra Steyr, kaj inter la pli ol cent ĉeestis ankaŭ tri hungaraj Ikarus-aŭtobusoj: la Ikarus 250, kaj, kiel specialaj, superklasaj busoj, la Ikarus-Steyr kaj Ikarus-Volvo, luksaj busoj por longdistancaj vojaĝoj. Ĉi lastajn prezentis la Motorveturila Eksporta Entrepreno (MOGÜRT).

La ĵurio, konsistanta el internaciaj fakuloj, kontrolis per instrumentoj la stabilecon, bremsadon, akceliĝon de la busoj, ilian eksteran kaj internan bruo-nivelon, precizecon.

La „stelo” de la ekspozicio fariĝis la superluksa aŭtobuso Ikarus 250 kun siaj grandaj panoram-fenestroj, kun sia eleganta interna instalaĵo.

La tn. konferenc-aŭtobuso enhavas 20 fotelojn facile turneblajn kaj facile provizeblajn per tabloj. En la fotel-apogiloj troviĝas laŭtparoliloj, reguleblaj de la pasaĝero mem. La komforton certigas klimatizilo, teokuirejo, vestejo kaj tueletejo kun duŝo. Laŭdezire konstrueblas ankaŭ radio-aparato kaj televidilo. Per la sescilindra motoro Rába-Man kun 210 ĉevalpovoj oni povas atingi rapidecon de 100 km/h.

La luksa aŭtobuso Ikarus-Volvo, servanta por longaj vojaĝoj, estis konstruita laŭ la postuloj de la Svedaj Ŝtatfervojoj, kun 48 komfortaj sidejoj aliformeblaj laŭ la specialaj vetercirkonstancoj. La aŭtobuso Ikarus-Steyr havas 40 sidejojn.

El la ekspozitaj 150 aŭtobusoj la duono gajnis nenian premion. Tiom pli granda sukceso estas por ni, ke la unuan premion de la karoserio-konkurso, la „Grand Prix de S. A. S. Le prince Rainier de Monaco” gajnis la superklasa Ikarus 250. Krome la Ikarus 250 kaj la Ikarus-Volvo gajnis pro siaj teknikaj kvalitoj arĝentan pokalon.

La Ikarus-Volvo gajnis krome, pro sia karoserio, la arĝentan pokalon „Prix d'Honneur”. La novecan instalon de sidejoj kaj la muntaĵon de la ĉasio kaj karoserio la ĵurio distingis per bronza medalo.

Unu grandan premion, tri arĝentajn pokalojn kaj unu bronzan medalon do akiris nia aŭtobus-industrio. Espereble, en la venontaj ekspozicioj ĝi kontribuos per pluaj rezultoj al la sekura kaj komforta vojaĝo de la pasaĝeroj.

Tr.: *P. Kristek.* Laŭ: *Istvánedza Patrubány*

Hungaraj pioniroj de la tekniko

Antaŭ duona jarcento mortis Donát Bánki, inventinto de la grandprema eksplod-motoro, membro de la Hungara Scienca Akademio.

Studinte en la Teknika Universitato en Budapeŝto, li fariĝis konstru-inĝeniero en la maŝinfabriko de la Hungaraj Ŝtatfervojoj kaj ĉe la firmo Ganz, fine, ekde 1899, profesoro de la Budapeŝta Teknika Universitato.

Li koniĝis unue per la iniciato de motorfabrikado en nia lando, kune kun János Csonka, poste, pro la kune kreitaj inventaĵoj ankaŭ mondrilate. En 1893 ili ricevis patenton por sia karburatoro, kaj en 1894 por la unua grandprema eksplod-motoro. En ĉi lasta, la eksplod-miksaĵon malvarmigas akvo, dispolverigata en la cilindron; per tio la rendimento de la motoro pliiĝas grandmezure.

Kvankam la dizel-motoro aperinta post kelkaj jaroj malhelpis la disvastiĝon de la Bánki-motoro, tamen la principon de la premkreskigo kaj akvo-enŝprucigo oni aplikis ankaŭ poste.

Lia akvoturbino konstruita en 1917, pro kiu li estis distingita per la granda premio de la Hungara Scienca Akademio, donis novan vojon por la evoluo de la liliputa akvocentralo.

Kiel fakverkisto, li okupiĝis precipe pri konstruo de turbinoj kaj hidromaŝinoj. La Maŝinindustria Scienca Societo fondis je lia memoro honormedalon, ĉiujare aljuĝatan al inĝenieroj atingintaj elstarajn rezultojn. Krome lian nomon portas memore la Maŝinindustria Altlernejo en Budapeŝto.

István László

BUDAPEŜTO

urbo centjara-urbo dumiljara

Budapeŝto estas la ĉefurbo de unu el la landoj, kiujn interplektas la rubando de Danubo. Urbo por mi naskiĝa, por vi gastiga. Iutempe, kiam ĉiu subite metropoliĝanta Mezeŭropa urbo ricevis de la gapmienaj vojaĝantoj sian ornaman epiteton, ankaŭ nia urbo ricevis la sian: Budapeŝto — la reĝino de Danubo.

Buda estis la mezepoka ĉefurbo de Hungario, *Óbuda* (Olda Buda) estis ĝia norda najbaro, kaj *Peŝt* situis sur la maldekstra bordo Danuba. Tiuj tri urboj unuiĝis en 1872—1873, do antaŭ cent jaroj, sub la nomo Budapeŝto. Dum la preparado de la jarcenta jubileo, antaŭ nelonge interkonsiliĝis la delegitaro de 24 Eŭropaj ĉefurboj, kaj decidis, ke en 1972 ili faros komunan ekspozicion en Budapeŝto pri siaj ĉefurboj.

Hieraŭ.

Jarcento? Jes, sed ĉu nur tiom? Kiu pensus, ke ĉi tiu loĝkolonio jam aĝas pli ol dumil jarojn? Ne multaj lokoj troviĝas en la mondo, kie tiom harmonie kunestas praa paseo, pitoreska pejzaĝo, mondfamaj kuracfontoj kaj moderna urbego. Ni haltu por momento ĉe la statuo de Petőfi sur la placo de 15-a de Marto: jen, najbare al la *Internurba Preĝejo* sub la tero kaŝiĝas grandvalora muzeo: arkeologiaj trovaĵoj de la iama *Contra-Aquincum,* kiu estis la plej orienta gvatejo de la Romia Imperio. El ties ŝtonoj oni konstruis la romanikan prapreĝejon, kiu poste estis trakonstruita barokstile kun gotika sanktejo. Apud tiu historia perlo fieras la plej moderna kabloponto, la *Elizabeta-ponto* — kia vere emocia kundensiĝo de epokoj en unu placo! Kaj de tie plej belas la panoramo de Buda, kronita per la restarigita kupolo de la iama reĝa palaco. Ankaŭ sur la Peŝta flanko altas du kupoloj por la rigardanto staranta sur Buda-burgo: tiuj de la *Parlamentejo* kaj de la *Baziliko.* La urbo estas kiel dolmano malsimetrie tajlorita: dekstre *Buda* — luksa rezidejo de iamaj reĝoj — vivas pleje en memoroj pri la paseo; maldekstre *Peŝto* vivas sian modernan vivon, bruan kaj svarmantan. Inter la du diskarakteraj partoj digne ruliĝas la riverego. Super ĝia onda, muskola korpo, kiel grandegaj bukoj, traarkas la pontoj.

Jen du polusoj de la urbhistorio: la skulptaĵaro de la Panoniaj militistoj sur la placo de 15-a de Marto kaj la *Monumento de Liberiĝo* sur la transborda *Gellérthegy* (Gerarda monto). Malfacilas eĉ listigi la eventojn inter tiuj du limstacioj: popolmigrado, terkulturistaj slavaj gentoj el sudo, la hungara patruj-okupo, la epoko de la reĝoj Arpadidaj, la tatara—mongola invado en 1241, sekvata de tutlanda fortikaĵkonstruado. Sur la Burgmonto, ĝis tiam neloĝata, Reĝo Béla IV. konstruigis rezidejon, kaj ĉirkaŭ la reĝa palaco kreiĝis la burĝa urbo, monaĥejoj, vilaĝetoj. Famaj estis la foiroj de Buda kaj la Buda-montaj vinoj. Peŝt fariĝis riĉa komercista urbo: en la tempo de reĝo *Mátyás* ĝi pagis plej multe da tributo. Dum la regado de la Anĵuaj reĝoj kaj de Mátyás Buda ege ekfloris, fariĝis juvelujo de la renesanca konstruarto, skolo akceptanta kaj elsendanta majstrojn. La fortmana *Mátyás* regulis, beligis, elkonstruis Budaburgon, farigis akvodukton laŭ la modelo de Firenze, funkciigis presejon. (Sur la loko de la iama Universitato konstruiĝos la *Hotelo Hilton.)* La rekonstruita Mátyáspreĝejo estas vera juvelo cizelita el ŝtonoj. En la tempo de *Mátyás* (1458—1490) en Italio cirkulis la onidiro: „Tri belegaĵoj ekzistas en la tuta Eŭropo: Venecio sur akvo, Budaburgo sur monto kaj Florenco sur ebenaĵo."

La loko de la Landkunveno ekde 1298 ĝis 1540 estis la kampo de *Rákos,* apud Peŝto. Tie kolektiĝis en 1514 la krucmilitistoj de *Dózsa,* kiuj poste fariĝis kampulribeluloj. En 1972 oni festos la 500-an datrevenon de la naskiĝtago de l' granda kamparan- insurekciestro *György Dózsa.*

De 1541 dum 150 jaroj mutis orgenoj kaj sonoriloj de Budaburgo: ilin anstataŭis turka tendara fajfilo kaj la kantoj de islamaj pastroj. Kiam *Sulimano* la Granda enrajdis la senhomiĝintan Budaburgon, trapaŝadis la reĝan palacon, pririgardis la mondfaman „Bibliotheca Corviniana" de *Mátyás,* eĉ eksonigis la orgenon de la kapelo, jene li ekkriis: „Ho, se ĉi tiu palaco estus nia serajlo en nia Istambul!" La laŭdo de malamiko estas pli kredinda ol tiu de amiko.

En 1686, per la reokupo de Budaburgo, la hungara popolo rekroĉiĝis al Eŭropo. Epokfara jaro! Preskaŭ ĉio pereis tutlande ĝis tiam, kaj preskaŭ ĉio estiĝis ekde tiu dato. Post la turkoj restis nur kelkaj minaretoj en kelkaj urboj, kaj, en Buda, banejoj ĝis nun funkciopovaj. Tiel la hodiaŭaj saniĝemuloj povas baniĝi en ejoj konstruitaj de turkoj.

Budaburgo, monumentaro de la ĉefurbo, estas 700-jara. Post ĝia rekonkero en 1686, ĉiu jarcento faris en ĝi riĉigon kaj ruinigon. Du plej grandaj eventoj estis: ĝia sieĝo fare de la hungaraj trupoj en la libermilito de 1848—1849, kaj la bataloj de la dua mondmilito en 1944—1945, kiam la hitleranoj ŝajnis kredi, ke ĉi tie ili almilitos la definitivan venkon. Sessemajne daŭris la aera bombado kaj tamburanta kanonado.

tiel ke en la tuta Burgo ne estis eĉ unu domo sendifekta. Kaj jen, el sub la deŝirita mortero disvolviĝis la iamaj konstruelementoj de romanika, gotika, renesanca, baroka stiloj: vera bildolibro de la historio.

Tiujn bildojn post la liberiĝo oni komencis restaŭri. La palaco mem fariĝis proksimume tia, kia ĝi estis antaŭ la ruiniĝo, sed kie oni povis, oni elsavis la malnovajn elementojn, tiel ke nun Budaburgo interne, kaj plurloke ankaŭ ekstere, estas moderna muzeo: Budapeŝta Historia Muzeo.

Sur la maldekstra Danubobordo, el la malgrava urbo Peŝto, ekde la fino de la 19-a jc., fariĝis urbego en apenaŭ 40 jaroj. La rapida industria evoluo faris ĝin teknika, scienca kaj trafika centro. Ĝi grandiĝis vasten: el branĉo iama de Danubo konstruiĝis la *Granda Bulvardo* kaj apude kaj transe de ĝi novaj loĝdomaroj kaj distriktoj. La miljara jubileo de la ŝtatiĝo (1896) intensigis la publikan konstruadon: kreiĝis la *Reĝpalaco,* la *Parlamentejo,* la *Muzeoj* kun la *Jarmila Monumento,* la granda avenuo kun la *Operejo.* La iaman flosponton jam meze de la jarcento anstataŭis la Ĉenponto *Széchenyi,* poste supre kaj malsupre de ĝi la pontoj *Margareta* kaj *Francisko-Jozefo* (nun ponto de *Libero).*

Ĉi tie koncentriĝis la temporezistaj memorajoj de arto Eŭropa kaj Azia: en la *Belarta* Muzeo kaj *Hungara Galerio* kaj *Orientazia Muzeo.* La *Nacia Muzeo* estas riĉa kaj plejeble plena kolekto de la hungaraj kulturajoj.

En 1896 ekfunkciis en Budapeŝto la unua subtera (subkrusta) tramo de la kontinento.

Poste la stilon de la ĉefurbo formis la eklektikismo kaj la t.n. secesio. La metropolo magnete altiris verkistojn, artistojn, politikistojn kaj scienculojn; ĉi tie boladis la klopodoj serĉantaj progreson. Budapeŝto iĝis la hejmo de scienco, arto kaj revolucioj kontraŭ la feŭdalaj restaĵoj de la lando, kaj, en 1919, por la socialismo. Ni memoru la tiaman Konsilian Respublikon, la nomon de *Béla Kun* kaj *Gy. Lukács,* la internaciistojn *F. Karikás, F. Münich, M. Zalka* kaj multajn aliajn. En la muziko ni memoru pri *Béla Bartók* kaj *Zoltán Kodály,* en la literaturo pri *E. Ady, M. Babits, D. Kosztolányi, Attila József, M. Radnóti, L. Kassák; M. Jókai, K. Mikszáth, Zs. Móricz, F. Molnár, T. Déry* ktp., krome pri la laborist-esperantistoj, inter ili la martirino *Katarina Hámán,* kaj ankaŭ pri la „Budapeŝta Skolo" inter la du mondmilitoj: *J. Baghy*

kaj *K. Kalocsay, V. Bleier, Emba, S. Szathmári, K. Bodó, L. Tárkony, F. Szilágyi.*

Hodiaŭ.

La nuna alveninto povas esti allogata de jenaj vizitindaĵoj:

Sude troviĝas CSEPEL, mondhaveno Danuba.

La nova Metro-linio iras ekde la iama *Rákos*-kampo subtere kaj sub Danubo ĝis *Vérmező* (=sangokampo; tiel nomata, ĉar tie estis senkapigitaj la „hungaraj jakobenoj" en 1795).

Buda estas ĉirkaŭata de montoj; ĝiaj ekstremaj partoj jam troviĝas sur ties mildaj deklivoj. Plej alta el la ĉirkaŭaj montoj estas la János-monto, kies pinton oni povas facile kaj agrable atingi per Telfero (Libegő).

Urb-rigardi oni povas ankaŭ veturante sur mikrobusoj aŭ sur promen-ŝipo. Somere interesa ripozejo estas la Romia Bordo de Danubo. Vintre la montoj prezentas skiejojn. La urbo havas plurajn boskojn, kie oni povas „troteti" laŭ la moda kuracista konsilo: „kuru por savi la vivon". Somere la montoj de Buda allogas por turismo, subĉielaj teatraj ludoj plezurigas la spektantojn. Kelkfoje en la Mátyás-preĝejo oni aranĝas eĉ „*beat*-meson"; estante bonŝanca, vi povas ĝin aŭskulti.

Sed ne licas forgesi pri la frandemuloj: mirindajn gustojn alsorĉas la artistoj de la hungara kuirejo en la *Mátyás*-kelo, en la *Gundel*-restoracioj, en la *100-jara* gastregalejo, ĉe la *„Apostoloj"*, en la historia *„Pilvax"* ktp. Ankaŭ la *Hotelo Duna Intercontinental* estas tre vizitinda.

Facile oni povas vojaĝi al la pitoreska *Szentendre*, kie troviĝas pentrist-kolonio, someraj ludoj, subĉiela muzeo (skanzeno). La *Danuba kurbo* estas plezurige pitoreska, kun la fortikaĵ-ruinoj de *Visegrád*. Pririgardinda estas la historie grava urbo *Esztergom* kun restaĵoj de antikva reĝpalaco, monumenta katedralo kaj la *Kristana Muzeo*. Ne malproksima estas ankaŭ *Székesfehérvár* (iama Alba Regia) rezidejo de Reĝo István I., la fondinto de la hungara ŝtato.

Ne forgesu gustumi ĉe ni la „hungaran kafon" kuiritan el Sudamerikaj aŭ Afrikaj kafograjnoj per italmaniera „espreso"-maŝino: 6 gramoj da kafo en duondecilitro da akvo. Ĉu ankaŭ hejme vi volos la kafon tiel kuirita?

Bonvolu akcepti nian afablan inviton: post 1929 kaj 1966 denove *ĝis la revido en Budapeŝto en 1972.*

Mária Rózsa Szabó

INTERESAĴOJ

En septembro de 1971. PIF (Pupteatra Internacia Festivalo) en Zagrebo organizis gast-rondvojaĝon por la Rumana Ŝtata Puptearo el Cluj (Rumanio) al Jugoslavio.

La pupteatro prezentis la spektaklon „La fabelo de la salo" de Aleko Popovici, tradukitan en Esperanton de Júlia 'Sigmond. En 1968, dum la unua PIF, la pupteatro gajnis per tiu ĉi spektaklo du unuajn premiojn: unu pro la alta nivelo de la prezento kaj unu pro la bona lingvouzo de Esperanto.

Ĉi-jare ili prezentis la spektaklon en Budva, en Vela Luka (sur insulo Korĉula), en Djeĉje apud Makarska kaj en Velika Gorica apud Zagrebo. Ĉie ili havis sukceson kaj per tiu turneo ili faris bonan poresperantan propagandon inter la geknaboj.

J. S.

***

La plej granda Sudamerika negoco de la hungara internacia komerco estis kontraktita en Lima. Laŭ la interkonsento nia lando liveros, por 13 milionoj da dolaroj, plenajn lernejajn garniturojn por la plenumado de la nova Perua mezlerneja programo en pli ol 400 lernejoj. En la pretigo de la garnituroj partoprenos ĉirkaŭ kvindek hungaraj fabrikoj. Traktadoj okazis ankaŭ pri tio, ke post la mezlernejoj ankaŭ la Peruaj Altlernejaj Institucioj ricevu de Hungario la necesajn garniturojn.

En cent-metra proksimo al la *Operejo en Vieno* malfermiĝis *„alterego"* de Budapeŝta kelrestoracio *Mátyás pince* (tiun kelon entuziasme laŭdis nia sveda leganto B. *Englund*, vd. HV. (2/1971. p. 30.). La tutan instalaĵon de tiu nova Viena restoracio oni pretigis en Budapeŝto. Tiel tiu kelrestoracio, — kiu enhavas bierejon por 300, manĝejon por 200 gastoj, — havas ne sole la saman meblaron, sed tute similan etoson, ja eĉ oni kopiis la originalajn panelojn. La aŭstra *Mathias Keller* (Matiaso-Kelo) havas la saman menukarton kiel la Budapeŝta, la manĝaĵojn kuiras hungaraj kuiristoj kaj hungaraj kelneroj surtabligas la pladojn laŭ maniero, kiel tio estas kutimo en la hungara Mátyás-pince.

Inter la novaj hoteloj de Budapeŝto akiris internacian rekonon la Hotelo *Duna-Intercontinental* konstruita sur bordo de Danubo. Laŭ la internaciaj spertoj ĝenerale almenaŭ tri jaroj estas bezonataj, ĝis oni ekkonas novan hotelon. Tamen la Hotelo Duna-Intercontinental jam post unu-jara ekzisto monde iĝis konata, kion pruvas, ke ĝi funkciis kun 80 procenta okupiteco. Tio precipe ĉe luks-hotelo jam signas tre altgradan utiligon.

Ĉu vi ŝatas HUNGARAn VIVOn? Rekomendu ĝin ankaŭ al viaj amikoj!

Por MODERNA STAPLADO

servas la modernaj elementoj
de fabrikaĵoj

DEXION-SALGÓ



La METALURGIA UZINO
SALGÓTARJÁN (Hungario)

fabrikas laŭ la angla patento Dexion
la fride fleksitajn, perforitajn
strukturajn elementojn sub nomo
DEXION — SALGÓ

DEXION-SALGÓ

PERFORITAJ STRUKTURAJ ELEMENTOJ
ESTAS OPORTUNE UZEBLAJ POR:

— *formi modernaj deponejojn*
— *modernigi, kompletigi la havatajn magazenojn*
— *konstrui staplojn dunivelajn, kun galerioj*
— *pli bona spac-eluzo de staploj*

El elementoj
estas konstrueblaj **DEXION-SALGÓ**

TIP–STABLOJ

Apartaj stabloj
Stablaroj kun bretoj
Paledo-stabloj

GALERIAJ STABLOJ

Plurnivelaj etaĝeroj
Stabloj traireblaj
Specialaj stabloj



La surfaco de elementoj

DEXION-SALGÓ estas

brultegita per kaŭterizita
grizkolora lako.
La elementojn fabrikas La

METALURGIA UZINO
SALGÓTARJÁN

Salgótarján, Malinovszki u. 63.
La elementojn eksportas la
Ŝtal- kaj Metaleksporta
Entrepreno METALIMPEX
Budapeŝto 62. Poŝtkesto 330.

panoramo

En Sorrento la reĝisora serio „Renkontiĝoj" finiĝis per la projekciado de filmo de György Révész kun la titolo „Vojaĝo ĉirkaŭ mia kranio". La tuta reĝisora serio en tiu ĉi jaro estis dediĉita al la hungara filmarto. La „Oran sirenon", la grandan premion de la festivalo en Sorrento ricevis Zoltán Fábry pro sia tutviva verkaro. La du premiojn de urbo Napoli ricevis István Szabó kaj Károly Makk. La honorarion de la plej bona aktorina kreado oni aljuĝis al *Mari Törőcsik* (bildo).

En la aranĝado de la Teknika Scienca Informa Instituto de KGM (Altforna- kaj Maŝina Ministerio) malfermiĝis en la pavilono de BNV (Budapeŝta Internacia Foiro) la ekspozicio Micronica 71, en kiu el 16 landoj 65 firmoj kaj 21 hungaraj entreprenoj prezentis la plej modernajn elektronikajn aparatojn kaj konsistaĵojn. El la socialismaj ŝtatoj Sovetunio, Germana Demokratia Respubliko, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Rumanio kaj Jugoslavio, el la kapitalismaj landoj Aŭstrio, Britio, Italio, Svedio, Japanio, Svisio, Germanio, Francio kaj Usono ekspoziciis siajn elektronikajn produktaĵojn.

Por la senĉese plimultiĝanta tendaro de la eksterlandaj kolektistoj de hungaraj poŝtmarkoj aperis la angla traduko de la prospekto de la hungaraj poŝtmarkoj indikanta la prezojn en dolaroj: baldaŭ sekvos germanlingva eldono. La verko havanta bongustan aspekton, koniganta ĉiujn niajn poŝtmarkojn en reproduktoj, kompletigas malnovan mankon. Ni opinias interesa konigi el ĝi kelkajn prezojn (v. sur la p. 9.).

En la Jugoslava Banja Luka malfermiĝis en festaj kadroj hungara belarta ekspozicio. La urbo plagita de tertremo en tiu tempo petis subtenon por la restaŭrado de sia detruiĝinta nacia galerio. La hungaraj belartistoj donis al la planita galerio pli ol 100 kreaĵojn.

La 1971-jaran fizikan Nobel-premion ricevis *Dennis Gabor* (Gábor Dénes) hungardevena inventinto de la *holografio*, la kemian Nobelpremion prof. Gerhardt Herzberg.

La holografio de prof. Gabor ebligas produkti tridimensiajn, do plastikajn bildojn. La inventon prof. Gabor ellaboris jam en 1947, sed nur en la sesdekaj jaroj, post la malkovro de la laseraj radioj, ĝi fariĝis perfekta kaj multflanke uzebla: ekde la medicino ĝis la prilaboro de indikoj, sur multnombraj terenoj malfermiĝas perspektivoj por ĝia praktika aplikado.

Gábor Dénes naskiĝis en 1900, studis en la Budapeŝta, poste en la Berlina Teknika Universitato. En la dudekaj jaroj li laboris en la Siemens-uzino, en 1934 transiris en Anglion. Nun li estas elektrofizika esploristo de la Londona *Imperial College*, kaj ekde 1967 lin ligas kontrakto al la Usona CBS Radio- kaj Televido-Societo, kiu akiris monopolon de lia metodo por ĝin apliki en la televida dissendo. En 1964 la Hungara Scienca Akademio lin elektis sia honora membro.

En 1971 en dek unu Afrikaj, Aziaj kaj Latin-Amerikaj foiroj sin anoncis la hungaraj eksportistoj en la organizado de „HUNGEXPO". La hungaraj komercaj ekspoziciistoj pliigis siajn Sudamerikajn partoprenojn en Ekvadoro, en Lima kaj en Santiago de Ĉilio.

La hungarlanda Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko funkcianta en la kadro de la Szegeda Somogyi-Biblioteko festas la 10. datrevenon de sia ekzistado-fondiĝo kaj en ĉi tiuj tagoj ĝi apenaŭ kapablas akcepti la jubileajn donacojn alvenintajn de la adeptoj de la movado. La plimulto de ĉi tiuj estas esperantlingvaj libroj kaj revuoj; ili grave riĉigas la grandan revuo-kolekton de la institucio kaj ties libro-nombron de dumil kvincent volumoj.

De HEA la biblioteko ricevis 300 volumojn E-lingvajn, de la Fervojista Fako kvintalon da revuoj; krome komercan kaj turisman prospekt- kaj libro-materialon tradukitan el la hungara lingvo diverslingven, ankaŭ en E-on, sendis la Budapeŝta esperantisto-veterano Pál Balkányi. De la Itala Fiat-uzino alvenis larĝ-ekrana filmo kun E-lingvaj surskriboj. Hukunaka Ikao, japana pacbatalanto, sendis materialon pri la internacia pacmovado. De aliaj venis fotoj, dokumentoj.

La Mondorganizo de la Trafikaj Muzeoj, kiu funkcias en la kadro de UNESCO, nuntempe aranĝis sian ĝeneralan kunsidon en Parizo. La internacia organizo, kiu koncentras 200 trafikajn muzeojn, elektis sia vicprezidanto d-ron Béla Czére, titolitan universitatan profesoron, la ĉefdirektoron de la Budapeŝta Trafika Muzeo.

En la tria internacia pentrarta festivalo de Cagnes-sur Mere el la hungaraj artistoj László Patay pentroartisto estis honorigita per nacia premio.

panorama

Pri la prezo de kelkaj hungaraj poŝtmark-rarajoj. *Plej granda maloftaĵo de Eŭropo: la 1968-jara limgardista ĵurnalmarko havas valoron de 11.500 dolaroj. Niaj aliaj du grandaj maloftaĵoj, la tiel nomata „turnita Madono" estas registrita kun 5000, la Nagymányai kun 4000 dolaroj. Nia 1871-jara litografita serio uzita estas taksata je 1000 dolaroj. El la modernaj eldonaĵoj la 1947-jara Rooseveltserio valoras 18, la blokparo 40, la UPU-blokparo aperinta en 1950 kostas 330, la 1951-jara viola (lila) blokparo 275 dolarojn; la 1959-jara soveta lunraketo-marko, de kiu la ruĝa koloro de la superpresado mankas, 300 dolarojn, la 1961-jara Gagarin-marko tranĉita 85, la 1966-jara I. pentraĵbloko 10 dolarojn.*

La historio de Hungarlando en soveta eldono. La konata soveta scienca eldonejo Nauka aperigas nun en rusa lingvo la unuan volumon de la Historio de Hungarlando pretigita de laborkomuno de rusaj historiistoj. Tio estos la unua ampleksa ruslingva verko pri la hungara historio. Du pluaj volumoj aperos en la jaro 1972

Okaze de la centjara datreveno de la estiĝo de Budapeŝto el la urboj Buda, Olda Buda kaj Peŝto, la Ĉefurba Konsilio invitis al Budapeŝto la Eŭropajn ĉefurbestrojn por renkontiĝo je aŭtuno de 1972.

EKKONU HUNGARLANDON!



VIZITU LA TURISTDOMOJN

Sándor Szathmári:

EMBA

Verŝajne en la jaro 1935 mi ekkonis virinon, pri kiu evidentiĝis, ke ŝi estas esperantisto. Ni ambaŭ parolis la lingvon sur komenca nivelo kaj ni decidis perfektigi nian lingvoscion.

Tiatempe, en la moderna palaco de la sindikato de la ferlaboristoj funkciis Esperanta laborista societo: ties kurson ni komencis viziti. Kaj poste, en tiu nia rondo, kelkfoje aperis viro, por inspekti la kurson. Li estis jam perfekta esperantisto, kaj lerte donis al ni instrukciojn por la lernado. Baldaŭ ni interkoniĝis kaj ni lin ekestimis.

Tiu viro estis *Emeriko Baranyai*, pri kiu ni baldaŭ eksciis, ke li estas jam rekonita esperantista poeto sub la pseŭdonimo *EMBA*.

Alvenis la ekzameno. Ĉiu lernanto devis pretigi iaspecan skribaĵon esperantlingve. Mi pretigis eseon, kies titolo estis: *Pri la metiartoj*. En tiu mi akcentis, ke la metiartoj krom la artaj celoj havas ĉefan celon, elmontri, videbligi, ke la posedanto estas riĉa homo. Tial pretiĝas la pimpaj vestaĵoj kun longaj baskoj, ornamegaj, skulptitaj mebloj, manĝilaroj, ornamaj ŝakfiguroj, ktp.

Mian eseon mi laŭtlegis, kaj ĝi ekplaĉis al Emba. Li petis ĝin de mi tuj post la ekzameno, korektis ĝiajn erarojn, poluris ĝin kaj sendis al *Sennaciulo*. Tie ĝi baldaŭ publikiĝis, kiel mia unua Esperanta artikolo.

Iom hontruĝe, sed mi devas konfesi, ke mi kulpis ankaŭ poemon. (Por ioma ekskuzo mi devas rimarkigi, ke ĉiu komencanto infektiĝas per tiu ĉi malsano.) Mi montris ankaŭ tiun poemon al Emba, kaj li indulge eksplikis sian opinion.

Do, tiel komenciĝis nia amikeco, kiun finis nur la kruela morto, kiu lin forportis.

Nun mi deziras skribi kelkajn vortojn pri lia vivo kaj poezio, okaze de la deka datreveno de lia morto. Do, mi devas antaŭe rakonti lian biografion. Pli ĝuste, rakontigi per li mem, ĉar lia biografio tute enestas en liaj poemoj. Ekzemple en *Tragedieto* li skribas pri sia naskiĝo:

En loko post la dors' de Dio
Okazis eta tragedio:
Patrino mia naskis min.

Ĉi tiu „tragedieto" okazis en 1902, en la malgranda vilaĝo *Alap* en departamento Fejér.

En la poemo *Martelkanto* li rakontas ankaŭ la metion de sia patro:

Botisto estis mia patro
kaj oftis ĉe ni serenad':
mi kvazaŭ eĉ nun aŭdas noktan
muzikon de la martelad'.

Kiel la patro, ankaŭ la filo luktis ĉiam kun la mizero, kiu instigis lin al amaraj poemoj. Sed tiuj poemoj estas la plej belaj: la mizero kaj doloro estas la plej eminentaj muzoj de la poetoj. La Infero de Dante estas multe pli grandioza verko, ol la Paradizo. Liaj poemoj pri la mizero estas ekzemple: *La ĝardeno de la patrino, Tago el mia vivo, Krizo, Vespersilento.*

En 1928 li aliĝis al la Esperanta movado. Samtempe li ekhavis kontakton al SAT, kies fidela kunlaboranto li estis ĝis sia morto.

Lia metio estis vendado de pentraĵoj, kiu estas unu el la plej malprofitdonaj okupiĝoj. Siajn malfacilaĵojn li priskribis en la novelo *Pordoj kaj domoj* (Sennacieca Revuo, jan. 1934) sub la pseŭdonimo *Spiro*.

Do, li havis ĉiun motivon, por ekmalami la sociordon de la ekspluatado kaj de naciismo. En la poemo *Mi* li skribas:

Denaske iĝis mi hungaro.
Sed same povus esti polo.
La tutamonda proletaro,
jen, mia lando, mia skolo!

Mi volas esti homo nura,
libera de la rudimentoj,
en kiu brulas flame pura
fratamo al la homaj gentoj.

Sed la plej granda plago estis por li la morto de sia fileto en 1933. El ĉi tiu plago devenas la plej trista poemo: *Eterna lulkanto.*

Pro perdita ido
ploras turto-par'
kaj la vent' kun frido,
ploron de amar'
portas, portas,
turne tordas
super la kovrilo
de lulilo
miozota
roskovrota...
Dormu, filo, eta filo.

En ĉi tiu tempo jam aperis pluraj liaj verkoj. La listo de liaj aperintaj verkoj estas: *En ekzilo* (poemoj), *La profeto* (tradukoj, SAT 1934), *Maria kaj la grupo* (prozo pri la aktivaj esperantistoj). Krome li estis kunlaboranto de *Enciklopedio de Esperanto.*

Dum la Hitlera faŝismo, kiam Esperanto estis persekutata, ankaŭ lia poezio devis silentiĝi. Dum ĉi tiu tempo li verkis, sed ne publikigis la poemon: *Rebrilos la stelo*, en kiu li enverŝis lian tutan malestimon al la diktatoro:

En ĉi mallumo, kiam sub boto de vandaloj
baraktas popolrajto, homamo, bono, belo,
inter la sufokataj homaraj idealoj
samsorte estingiĝas la lum' de verda stelo.

Sed jam fortondris la giganta malvenko ĉe Stalingrad, do, li daŭrigis jene:

Mateno ekkrepuskis! Esperas jam denove
popoloj turmentitaj. Eksplodas jubilkrio!
Leviĝos uraganoj kaj forbalaos blove
ĉi tiun malpuraĵon de l' homa historio!
Kaj nia lingvo vivos kaj sur la Vojo plue
ni povos marŝi rekte, kuraĝe en la celon.
Kaj staros la ekzemplo ateste kaj instrue:
PEREOS KIU VOLAS ESTINGI
NIAN STELON

La aŭguraĵo baldaŭ plenumiĝis: la diktatoro pereis.

La liberiĝon li salutis per ekstaza ĝojo. El tiu tempo devenas liaj poemoj: *Demokratio vivu! Majkanto, Sur larĝaj kampoj, La penso, Lampo kaj steloj.*

Ĉiam li esperis la liberan prosperiĝon de nia lingvo en la nova sociordo. En *Majkanto* li skribas:

Tago, tago, maja, tag'!
Flirtu alte verda flag'.
Mondlingvanoj estas ni,
verdan Majon festas ni.

En „*Lampo kaj steloj:*"

La ruĝa stelo brilas kare,
kaj ni esperas, ke en belo
esperradia kun ĝi pare
rebrilos nia verda stelo.

Sed ho, ve! Baldaŭ forvelkis la esperoj! Venis la epoko de la persona kulto kaj ni devis denove eksilenti, kvazaŭ ni havus ian gravan pekon. En *Enigmo* li skribas:

Sed kial do silentas
la esperantaj bekoj?
Ĉu ili mute pentas
pri iaj grandaj pekoj?

En *Glacirompiĝo* ni legas:

La vivo vintris. Dikis neĝtapiŝoj.
La frosta ĉiopovo brove murdis,
plej sanktajn vortojn preĝmaŝine gurdis
adeptoj kaj gazetoj kaj afiŝoj.
Paroli oni rajtis nur en kliŝoj.
Jam ĉiu homo vostosvinge hundis.

Tiuj estis liaj sociaj poemoj. Plenaj de nostalgio al la libero kaj al la mondlingvo. Laŭ lia deviza poemo:

Printempe kaj aŭtune,
subpluve kaj subsune,
en frosto kaj en ardo,
en fruo kaj en tardo,
feliĉe kaj missorte,
ĝisoste kaj ĝismorte
mi estas via adoranto
Liber kaj Esperanto!

La sama, pura animo respegulas sin en ĉiuj liaj poemoj: nostalgio al la naturo, pura, sed ne pruda amo al la virino. Ekzemple en *Vana, vana:*

Memoro pri knabino kamparana
en mia koro eĉ nun alte arkas
kaj ŝia orblondeco vive sana
en la anima fundo sparkas, sparkas.
Mi scias, ke pasinta printemphoro
neniam plu revenas sama, sama
kaj la serĉado de velkinta floro
inter la novaj estas vana, vana.

Sed li verkis ankaŭ kelkajn vinkantojn. Ekzemple: *Drinkokanto:*

Amikoj, levu, levu glason,
la tempo ne ĉesigas pason,
do, drinku ĝis la fund',
ja post dimanĉo venas lund'!

En bona vino estas flamo,
arom' magia, sorĉbalzamo,
do, drinku ĝis la fund',
la akvo restu por la hund'.

Jes, li ankaŭ reale malplenigis la glason ĝis la fund'. Kaj tiu lia pasio verŝajne akcelis lian malsanon. Ĉar li havis ftizon.

En 1961 STAFETO akceptis eldoni lian poemlibron *Ekzilo kaj Azilo,* kio tre ĝojigis lin, sed la sorto ne lasis al li ĝisvivi la eldonon. Li mortis la 30-an de novembro, 1961.

Ni citu ankoraŭ strofon el *La penso,* kiu plej klare respegulas liajn ideojn:

La penso estu plej libera,
kiel la birdo en aer',
kiun ne baras reto fera,
nek feraj leĝoj de la ter'.

Jes, li estis puranima, humana homo, inda al esperantisto. Liaj poemoj ne celis la komplikadon de la formo. Li havis valorajn pensojn kaj kiu havas pensojn, ne bezonas kaŝi la senenhavon de la poemo per sagacaj jongladoj de la formo.

Dum Via vojaĝo en Hungario certigas Vian komforton

EN STACIDOMOJ
restoracio, bufedo, nutraĵ-pavilono

EN TRAJNOJ
litvagono, restoracivagono, bufedvagono

EN ŜIPOJ
restoracio, bufedo

EN LONGDISTANCAJ AŬTOBUSOJ
bufedo

UTASELLÁTÓ

Favorpreze certigas la manĝigadon de turistaj grupoj la Pasaĝerproviza Entrepreno. Informojn donas kaj la ŭdezire skribitan informon sendas la Pasaĝerproviza Entrepreno Budapest V., Veres Pálné u. 24 Tel.: 189-900/160

BUDAPEŜTO—MUZIKURBO

Muzikamantoj ŝatas kaj alte taksas rememorajojn pri grandaj muzikistoj kaj altnivela muzikarto. Por ili Budapeŝto estas vera juvelkesto.

Se eksterlandano vizitas la ĉefurbon de Hungario, oni montras al li antaŭ ĉio la kvartalon de la Fortikaĵo, Budaburgon. Ne estas eble denombri ĉion, kio estas tie vizitinda por muzikemuloj. Certe sufiĉas mencii, ke ĉe la kortego de Buda jam antaŭ multaj jarcentoj troviĝis mondfamaj eksterlandaj muzikistoj, kiujn allogis la brilo kaj gloro de la muzikamaj hungaraj reĝoj. Precipe sub la regado de reĝo Matiaso (1458—1490) la pompo de la kortego de Buda estis konata en la tuta mondo. Tiam multaj famaj muzikistoj de la epoko vizitis Budaburgon. Eĉ pliiĝis la muzika kulturo post la dua edziĝo de la reĝo. Lia edzino estis la filino de la reĝo de Napolo kaj la kortega vivo, kiu evoluis dum ŝia restado en Hungario, altiris multajn internacie konatajn artistojn, precipe muzikistojn al Buda.

En la ĉirkaŭaĵo de Budaburgo estis la teatro, en kiu en 1800 Ludvig van Beethoven prezentis proprajn kompoziciojn kun la tiam fama flutovirtuozo Punto.

En la centro de Budaburgo troviĝas la impona Kronada Katedralo, kie en la jaro 1867 la unuan fojon estis prezentata la „Kronada Meso" de F. Liszt. La komponisto povis nur kaŝe aŭskulti sian verkon, ĉar la tiamaj kortegaj kompetentuloj intencis per ĉiuj rimedoj malhelpi la venkon de lia revolucia muziko, enhavanta motivon de Rákóczi-tempa kanto. Kiam Liszt forlasis la preĝejon, la kolektiĝintaj popolamasoj ovaciis lin pli forte kaj entuziasme, ol la ĵus kronitan reĝon.

En la centra parto de la alia Danubobordo troviĝas la *Operdomo*. Kiuj vidis jam la grandajn operdomojn de la okcidentaj landoj, tiuj eble trovas ĝin ne tre granda kaj iom simila al la Pariza aŭ Viena. Tamen jam la unua impreso al ĉiu, vidanta la Budapeŝtan Operdomon, estas favora: oni ekvidas du grandajn statuojn en la konstruaĵo; ili figuras du grandajn majstrojn de la hungara muzikhistorio: F. Liszt kaj F. Erkel kaj memorigas ĉiun, kiu vidas ilin, pri tio, ke ambaŭ muzikistoj estis hungaroj, kiuj pasigis gravan vivparton en Budapeŝto.

Mondfamaj kantistoj, muzikartistoj rolis en la Operdomo de Budapeŝto; bone konataj orkestrogvidantoj agadis tie, ekz. Gustav Mahler, kiu dum pli ol tri jaroj estis ĝia gvidanto. Granda estis lia merito, kiam li likvidis la „stel"-kulton en la opera kulturo de Hungario. Ankaŭ la mondfama hungardevena muzikestro Arturo Nikisch estis dum du jaroj direktoro de la Budapeŝta Operdomo.

Multaj hungaraj kaj eksterlandaj operverkoj estis prezentataj en la Operdomo, inter aliaj la nun jam mondfamaj kaj ĉie konataj scenejaj muzikverkoj de Béla Bartók — *La kastelo de princo Blubarbo, La lignoskulptita princo* kaj *La mirinda mandareno*. Precipe post la liberiĝo de la jaro 1945 multaj hungaraj operoj estis videblaj kaj aŭdeblaj en la Operdomo, kiuj fariĝis poste konataj en fremdaj landoj kaj kontinentoj.

Alia Budapeŝta konstruaĵo, kiu rilatas la muzikan vivon kaj estas inda je atento, estas la Muzikarta Altlernejo „Liszt Ferenc". Ĝia hodiaŭa konstruaĵo estis inaŭgurita en 1907, antaŭe ĝi troviĝis en alia loko. La Altlernejo — kies tiama nomo estis „Muzikakademio" — estis fondita en 1875 kaj ĝia unua prezidanto estis F. Liszt, kiu de tiam sentis sia devo pasigi gravan parton de la jaro en Budapeŝto. En la nuntempa konstruaĵo de la Altlernejo estas vizitebla aparta Liszt-ĉambro, kun interesaj rememoraĵoj, muzikinstrumentoj, libroj, muziknotoj ktp. de Liszt. La Altlernejo fariĝis en la daŭro de la jaroj bone konata instituto, en kiu ankaŭ nun multaj estontaj muzikartistoj lernas, devenantaj el multaj landoj kaj kontinentoj. Multaj mondfamaj muzikistoj estis en ĝi instruistoj; estas sufiĉe mencii la nomojn de Jenő Hubay, Ernő Dohnányi, Béla Bartók, Zoltán Kodály, Leo Weiner kaj multaj aliaj.

En la norda parto de Budapeŝto troviĝas la ruinoj de la iama romia garnizono Aquincum, kie estas videbla la plej malnova orgeno de la mondo. La pli ol 1700-jara muzikinstrumento estas interesa ne nur por fakuloj, sed inde estas ĝin viziti por ĉiu veninta al Budapeŝto. (Pri ĉi tiu orgeno ni aperigis artikolon en la numero 1967/3 de nia revuo.)

Ni ne devas forgesi, ke Béla Bartók, unu el la plej geniaj komponistoj de nia tempo, loĝis, komponis kaj laboris en Budapeŝto. Sur la muroj de kelkaj loĝejoj de Bartók (ekz. Szilágyi Dezső tér 4.) memortabulo atentigas pri tio. — La placo, kie loĝis Zoltán Kodály, estas nomata laŭ li.

Budapeŝto pruvas sin muzikurbo ankaŭ per tio, ke interesaj kaj altnivelaj koncertoj, eĉ operprezentadoj estas aranĝataj ĉi tie ankaŭ somere, kompreneble subĉiele. Tiamaniere eĉ en la plej varmaj tagoj la muzikamantoj povas ĝui bonan muzikon inter agrablaj kondiĉoj.

Jen kelkaj karakteraj trajtoj pruvantaj, ke Budapeŝto estas prave nomata muzikurbo.

Lajos *Lesznai*

POLLANDO

— patrio de Ludoviko Zamenhof,
la aŭtoro de la lingvo Esperanto

— proponas riĉan turistoprogramon!



ORBIS

Artmonumentoj de miljara historio, multvariaj pejzaĝoj: La pola Marbordo, la Lagoj Mazuraj kaj la refreŝigejoj de Pola Tatro atendas la turistojn!

LOT: LA POLA AERTRAFIKA ASOCIO

certigas rapidan kunligon
el 28 urboj de Eŭropo
kaj Afriko al Varsovio!



ORBIS
Pola Fremdultrafika
Informa Oficejo
Tel.: 184-908
Budapeŝto, V. Vörösmarty tér 6.
LOT
Pola Aertrafika Asocio
Tel.: 184-475
Budapeŝto, V. Vörösmarty tér 6.

Detala informado ĉe la agentejoj de la Pola Fremdultrafika Informa Asocio ORBIS kaj de Pola Aertrafika Asocio LOT en la sekvaj urboj

AMMAN
AMSTERDAMO
ATENO
BEJRUTO
BEOGRADO
BERLINO
BRUSELO
BUDAPEŜTO
BUKAREŜTO
FRANKFURTO/M
ĜENEVO
HELSINKI
ISTANBULO
KAIRO
KOPENHAGO
LENINGRADO
LONDONO
MADRIDO
MILANO
MOSKVO
NOV-JORKO
NIKOZIO
PARIZO
PRAGO
ROMO
SOFIO
STOKHOLMO
VARSOVIO
VIENO
ZURIKO

Lajos Tárkony

REVUO DE REVUOJ

Pri KOMUNA E-GAZETO, organo de E-organizoj Nederlandaj, mi raportis jam plurfoje, kaj laŭ mia opinio, ne senmerite. Ĝia riĉeco evidentigas, ke „unueco estas forto". Oni povus mireti pri tio, ke „N-landa Katoliko", „Kristana Unuiĝo", FLE (ala al SAT) kaj „N-landa E-o" (ala al UEA) tiel pace loĝadas sub tiu sama tegmento, certe, ke ĉiu ĝuas plenan aŭtonomion. Komunaj estas la movadaj paĝoj kaj Lingva Rubriko; en ĉi lasta estas tre instruaj la lingvaj ekzercoj, malpli la teoriaj lingvaĵoj (tamen pri la senco de „kutimi" mi konsentas). Menciindas la bonaj recenzoj de *T. Boersma;* mi laŭdu lian objektivan bonvolon en lia recenzo pri „Horizontoj de Soveta Litovo". Aprecinde, la gazeto ŝajnas varti ankaŭ la literaturon: *Verloren van Themaat* tradukis en la Nederlandan lingvon poemojn E-ajn kaj pripoezian traktaton de *Auld. S. Aarse* aperigis poemtradukojn en E-o: sonetojn de *J. Perk* kaj de *Henrieta Holst,* laste poemon el *Goethe* („La Elfreĝo"). Ĉi tiun, tamen, jam tradukis *Grabowski,* eĉ dufoje (kaj libere kaj por kantado), poste ankaŭ *Kalocsay;* bedaŭre, la Aarse-traduko estas malpli kontentiga ol la antaŭaj. Jen kelkaj ĝiaj makuloj: *prem'* devus rimi kun *hejm', ne* kun *herbej';* kvarfoje interrimas personaj pronomoj *(mi-vi, min-vin* ks.), „nokton ĉi" en la unua verso estas perforta solvo; unu „nur" estas metita sole por rimi. Do, ĝuste la duono de la rimoj estas surda. Kial S. Aarse trudis al si la klopodojn por fari poemtradukon malpli bonan ol la antaŭaj? La plej verŝajna kaŭzo estas la plej trista: li ne konis tiujn tradukojn. Jen kio vere alarmas, ke oni devus tiujn tradukojn alirebligi. Grabowski kaj Kalocsay multe perfektigis en E-o la versteknikon kaj tradukarton; se iliaj tradukoj restos kaŝitaj, oni devos refari, kion ili jam plenumis.

La gazeto DER ESPERANTIST aperas en la Germana Demokratia Respubliko jam la 7-an jaron; ĉiuj ĝiaj numeroj kuŝas nun antaŭ mi. Bedaŭrinde, mi ne povas ilin detale pritrakti: tio postulus mian tutan lokon ĉi-numeran. Mi parolas do nur pri la ĉi-jaraj numeroj. Ĉiu el ili enhavas gvidartikolon interesan: pri la unuaj ekzamenoj por kursgvidantoj; pri la granda germana romanverkisto Heinrich Mann, nekrologe; pri la 8-a partitago, kiu emfazis la bezonon pliprofundigi la ĉiuflankan kunlaboron de la socialismaj ŝtatoj (kaj „ĉiuflanka" signifas ankaŭ „interesperantista"). Ne povas resti sen mencio la ampleksa recenzo de *Detlev Blanke* pri la „Poemoj de Heinrich Heine en Esperanto", tradukitaj de *Kalocsay* kaj *Waringhien,* eldonitaj de Stafeto. Bela poemo de *A. Logvin* funebras la forpason de *E.A. Bokarev,* granda lingvisto kaj fervora E-isto. Interesa estas la intervjuo kun la sovetiano *G. Korotkeviĉ,* E-isto ekde 1932: *Varankin* apartenis al liaj konatoj (ĉu iam reaperos lia romano „Metropoliteno"?), Aparta rubriko „Metodiko" servas por lingvoinstruantoj. Kaj ripete ni notu la gravan entreprenon de *Curt Kessler,* kiu germanajn parolturnojn interpretas en E-o, kaj la aktualecon de lia laboro samcela al nia „Domfabriko".

LITERATURA FOIRO estas vigla gazeto dumonata, organo de la rondo „La Patrolo" kaj presata en Italio. Ĝi estas multflanka gazeto, sed montras specialan inklinon al la literaturo, precipe al la poezio. Ĝi konigas italajn poetojn (Leopardi, Quasimodo), donante de ili ankaŭ poemtradukojn; esperantistajn poetojn (Grabowski, Clelia Conterno Guglielminetti, Miĥalski, Hohlov). Interesaj estas: intervjuo kun Emilia Lapenna, trarigardo de la sciencfikcia literaturo E-a. Kaj ni ellevu la poemojn de *Nicolino Rossi,* granda promeso de nia poezio. Ni esperas, ke la gazeto plene pravigos la vortojn de *C. Minnaja,* skribitajn en la gazeto: „Italaj esperantistoj ne estas malverkemaj".

L' ESPERANTO, oficiala organo de la Itala EF interese raportas pri la agado de la Itala Instituto de E. Okaze de la diskuto ĉe la 8-a parlamenta komisiono pri leĝpropono nro 1489 (enkonduko de E. en la lernejojn) la direktoro de la Instituto intertraktis kun la vicministro de la publika instruado. Rimarkiĝis, ke la ministeriaj medioj estas tre malmulte informitaj. Oni planas novajn intertraktojn, por ke la ministerio esprimu sian opinion favore al la enlernejigo de E. — En *Sant' Arcangelo di Romagna* okazos la tradicia *Kokfesto* la 14-an de novembro kun konkurso de poemoj kun la temo *La Rostita Koko,* senditaj al *E-katedro de Gastronomio.* Kun agrabla surprizo mi sciiĝis pri la ekzisto de tiu ĉi katedro, esperante, ke inter ĝiaj planoj troviĝas ankaŭ verkado de grandioza Universala Kuirlibro, kompreneble kun internacia kunlaboro. Mi opinias, ke tia libro estus tre grava ankaŭ el propaganda vidpunkto.

En BOLETIN, lasta lastjara numero, *F. de Diego* pledas por laboro simila al nia Domfabriko: „kontraŭ la bildoriĉaj esprimoj naciaj, kiujn ni konstante uzadas, ni volas ne palajn, senanimajn redonojn, sed ekvivalentojn tiel sukajn kaj esprimivajn kiel la originaloj". El liaj ekzemploj ni citu: *tondi ĝishaŭte, spronurĝe, plumknaristo, hirtiĝi kontraŭ iu, urtikon frosto ne mortigas, ansera haŭto, mordi graniton, alkroĉi sin al pajlero, ne trafi la ĝustan klavon.*

En la SENNACIULO (1971. VI.) ni trovas la kutiman sapvezikon de D. *Dimitrijeviĉ-Russchity* pri sennaciismo kaj ŝtato: li konceptas la sennaciismon kiel ian socian sistemon, kiu „humanigas, nobligas, riĉigas, konstruas". Kiel kutime, ankaŭ nun li forgesas indiki, kiamaniere estiĝos tiu ĉi admirinda sistemo. — Valora estas la ampleksa recenzo de *Duc Goninaz* pri PIV. La neologismo-ĉasadojn li nomas „sensencaj polemikoj"; nu, la recenzoj en S-ULO kutime restriktiĝas je tiaj „sensencaj" protestoj kontraŭ la lingvoriĉigo... — En la artikolo de *Petro Levi* troviĝas jeno racia: „la fundamenta demando estas jena: je kies dispono staras la produkto-rimedoj..." Jes, tio estas la fundamenta demando kaj ne la sennaciisma dogmaro. Poste *P. Levi* parolas ankaŭ pri burokrataro uzurpanta la socialismon. Nu, la plimultiĝo de la „blank-kolumuloj" (laŭ la konata „leĝo de Parkinson") estas mondfenomeno postulata de la teknika evoluo, krome *P. Levi* ŝajne ne scias, ke kontraŭ la burokratara uzurpado, por ties prevento kaj elimino, ĉie en la socialismaj landoj daŭras publika batalo, akra kaj ne senefika.



AFIT SERVICE

DUMVOJA PROVIZORA
RIPARO DE PASAĜER—KAJ
ŜARĜAŬTOMOBILOJ
GARANTIA SERVO
RIPARO DE PERTURBOJ
STATKONSERVADO
ĜUSTIGO DE RADOJ
KONTROLO
PER INSTRUMENTOJ

RAPIDA – PRECIZA – FIDINDA

AFIT

AŬTOMOBIL-RIPARA ENTREPRENO

XVI. sz. AUTÓJAVÍTÓ VÁLLALAT
MISKOLC, Zsolcai kapu 9—11



ZOLTÁN LENKEY

Li apartenas al la plej moderna branĉo de la nuntempa hungara grafikarto. Se la adeptoj de ĉi tiu artgrupo parolas, diskutadas pri ties stilo, ekspozicio, se la kritikistoj, arthistoriistoj skribas pri ĝi, tiam post la elstara, originala talento Béla *Kondor*, kiu kreis skolon jam en siaj komencaj jaroj, oni menciadas tuj *Zoltán Lenkey*. Ankoraŭ li estas juna homo, naskiĝis 1936, en Miskolc, do li kapablas prezenti fidele siajn samtempulojn, ilian vivmanieron, karakteron. Bone ilustras ĉi tiun trajton de Lenkey la tutpaĝa desegnaĵo, ĝia titolo: „Beat"-kantisto. Li estas tre eksperimentema artisto, oni povas observi liajn temojn, variaciojn kaj rezultojn ĉefe sur liaj multnombraj akvafortoj.

Li finis la Belartan Altlernejon en 1962, de tiam li rolas en ĉiuj pli grandaj patrolandaj ekspozicioj, li partoprenis en Grafika Bienalo de Krakovo (1966, 1970), Tokio (1966), Sao Paolo (1967), Lugano (1968). Liaj folioj estis ekspoziciitaj inter la kreaĵoj de hungaraj eminentaj grafikartistoj aranĝitaj en Essen, Okcidenta Berlino, Moskvo, Bologna, Kiel, ktp.

— *gm* —

LÁSZLÓ BENJÁMIN:

LA KNABO EDUKITA DE LUPOJ

Ja kvietiĝos impulsoj ekscesaj,
tero glutos homfuriozojn,
kaj pesos posteuloj,
kiom da gramoj pezis niaj proces-kvintaloj.

Kun prudento humana mi volis vivi
kaj la momenton vidi kaj juĝi
ankaŭ per vido de homo mil jarojn
pli saĝa ol mi kaj pli nobla.

Mi ne sukcesis. Tiel ja mi vivis
kiel knab' edukita de lupoj,
en hordo de jaroj ungaj-dentaj
lupide mi vivis miajn tagojn.

Mordo de dentoj, grato de krifoj
en min inokulis la praregulon:
Fronte, neniam dorse al la mondo
kun tendenoj elstreĉitaj korde.

Ho, kiel mi ellernis la batalon
tenace kun lup-pacienco!
Miraklo stranga, ke en mia koro
la homa leĝo ne estingiĝis.

Mi ne volas, ke ankaŭ la aliajn
doloru la mondo! En miaj nervoj
hororas generacioj dekumitaj.
Mi jam ne atakas, nek plu defendas min.

El febroj elsaniĝinte, restos viva la mondo.
Kaj se el miaj ruboj, rusto kaj ŝlimo,
el fatraso de miaj barbaraj furiozoj
vi elvolvos la pasion puran,

kaj legi vi povos el la deformiĝinta
suspektema, kruela vizaĝo — mi kredas —
tamen vin mem vi rekonos el miaj trajtoj,
praido malsovaĝiĝinta.

Tr. *K. Kalocsay*


Lenkey Ito.

Hungarlando gastigis la 1-an Ĉasistan Mondekspozicion

La 30-an de septembro fermis la pordon en Budapeŝto la 1-a Ĉasista Mondekspozicio. Tiu hungara iniciato alportis multe da rezulto kaj sukceso, pli multe ol antaŭvidite. 52 landoj el la kvin kontinentoj partoprenis kaj ekspozis en la Mondekspozicio, inter ili 35 landoj (21 Eŭropaj, 8 Afrikaj, 4 Aziaj kaj 2 Amerikaj) prezentis en apartaj pavilonoj riĉan nacian materialon koneksan kun la ĉasado kaj naturprotektado.

Dum la ekspozicio oni enskribigis por prijuĝo ĉastrofeojn kvante kaj kvalite superantajn tiujn de ĉiuj ĝisnunaj internaciaj ekspozicioj. El ili 5778 pecoj venis al prijuĝo de internacia ĵurio. Se doni kelkajn indikojn: 1114 cervokaj 1137 kapreolkornaroj, 835 aprodentegoj, kornoj de 462 Afrikaj kaj 259 Aziaj gazeloj kaj antilopoj, 325 Alpaj ĉamoj, 186 muflonoj, krome granda nombro da aliaj sovaĝbestoj, kiel lupoj, linkoj, sovaĝkatoj, ursoj ktp., -sume trofeoj de 48 bestospecoj estis prijuĝitaj.

La ekspozicioj de la Aziaj kaj Afrikaj landoj rikoltis grandan sukceson per siaj — ĉe ni apenaŭ aŭ tute ne konataj — temoj, dum la pliparton de la prezento de la Eŭropaj landoj kompletigis la ekspozo de industriaj varoj koneksaj kun ĉasado kaj turismo.

La ekspozicion vizitis 1,8 milionoj da personoj, inter ili 200-mil eksterlandanoj. En diversaj tagoj oni aranĝis „Nacian Tagon" por 25 nacioj, okaze de kiuj altrangaj personoj el la koncernaj landoj alvenis kaj ĉeestis la solenaĵon. Se mencii kelkajn el la eminentuloj, la Mondekspozicion vizitis interalie: L. I. Breĵnev, la partia ĉefsekretario de Sovetunio, princo Filipo de Edinburgh, edzo de la angla reĝino, la prezidanto de la Internacia Ĉevalsportista Federacio, la Nepala reĝo, du princoj el Irano, la belga vic-ministroprezidento, la franca ministro de eksterlandaj aferoj, pluraj ceteraj ministroj kaj altrangaj oficiroj el diversaj landoj.

Laŭ la raporto de la hungara ministro de agrikulturo kaj nutraĵaferoj la koncepto kaj teoria konstruo de la Ĉasista Mondekspozicio estis ĝusta, en ĉiuj rilatoj ĝi atingis pli altajn sciencan kaj kulturan nivelojn ol la pasintaj similaj ekspozicioj. Al la sukceso de la Mondekspozicio, daŭrinta tutan monaton, konsiderinde kontribuis diversaj fakaj, priartaj, sportaj kaj distraj aranĝoj. Signifaj kontribuoj estis la Internacia Scienca Konferenco pri Ĉasado, la Internacia Ekspozicio de la Figuraj Artoj kaj la 1-a Internacia Naturfilmo-Festivalo kun 150 filmoj pri ĉasado kaj naturprotektado.

La ĉevalkonkursaj aranĝoj de la Mondekspozicio meritas apartan mencion. Dum 4 tagoj disvolviĝis en la teritorio de la ekspozicio la 1-a Eŭropo-ĉampionado de drajvo (jungaĵkondukado). El la konkurso, kiun partoprenis 8 nacioj kun po 3 jungkvaropoj (kvarĉevalaj jungaĵoj) — inter kiuj menciindas la oldaj svisaj montaraj poŝtveturiloj, la jungkvaropo de la angla reĝino, kaj la blankaj virĉevaloj de la 100-jara ĉeĥa ĉevalaro en Kladrub — la hungaraj drajvistoj hejmenportis la tri unualokajn premiojn de la kunmetita konkurso kaj kromajn 2 orajn, 2 arĝentajn kaj 3 bronzajn medalojn.

Fermu la mallongan raporton la konstato de nia ministro de agrikulturo, laŭ kiu la 1-a Ĉasista Mondekspozicio multflanke prezentis la interligon inter la homo kaj lia natura ĉirkaŭaĵo; fake kaj samtempe spektakle direktis la atenton de centmiloj al la naturproblemo de nia epoko; donis internacian forumon al dekmiloj da fakuloj; kaj kontribuis al la evoluigo de amikaj interrilatoj inter la landoj de diversaj kontinentoj kaj al la interproksimiĝo de la popoloj.

Tibor Ujlaky-Nagy

GRANIdress GRAdiamant

GRANItex GRANIcut

GRANIflex GRAdiffil

POLIDIA

DIACUT

CS

K GY

GRANIT

RUBIDENTA

VIBROX

50

1922-1972

GRAmesh GRAfile GRANI roll

GRANIT

FABRIKO
DE FROTODISKOJ
KAJ ŜTONVAZOJ

BUDAPEST, XIX. FADRUSZ JÁNOS UTCA 2.
TELEFONO: 471-118 TELEX: 3467 GRANIT BUDAPEST



Restaĵoj de la islama arkitekturo en Hungarlando

La lando de la turka popolo situas fore de nia mez-eŭropa patrio, en la orienta kontinento Azio, distance de pli ol milo da kilometroj. Rajte vi demandas do, kiel estas videblaj ĉe ni konstruaĵoj de la islama arkitekturo? La respondon vi ricevas de la hungara historio.

La fatala militperdo kontraŭ la turkoj sur la batalkampo ĉe urbo *Mohács* en 1526 jam krude avertis pri la danĝero minacanta nian patrion fare de la turka imperio, kiu konkersoife ŝovis antaŭen sian armeon kontraŭ la okcidentaj landoj. Vere, jam en 1541 la ĉefurbo de nia lando, Buda estis definitive konkerita kaj de tiam komenciĝis tiu trista periodo, kiam la triono de la tiama lando estis daŭre subpremata de la turka potenco dum unu kaj duono da jarcentoj (1541—1686). La meza landparto iĝis la plej okcidenta limo de la mahometana mondo. Ĉi tie renkontiĝis du mondoj ĝisfunde diversaj sub signoj de kristana kruco kaj turka duonluno. Tiu diverseco post certa tempo montriĝis okulvideble en la eksteraj aspektoj de la urboj. Kupolkovritaj moskeoj, karakterize tegmentitaj turkaj banejoj, sveltaj minaretoj borantaj sin en la firmamenton donis specife orientan silueton al niaj pli grandaj urboj kiel *Buda, Peŝt, Eger, Pécs.* Vojaĝantoj el foraj okcidentaj landoj, alvenintaj la mezan parton de la hungara tero, ĉi tie jam atingis la sojlon de tute alia, por ili bizare fremda orienta sfero. En Okcidento en tiuj jarcentoj post la gotiko kaj renesanco ekfloris la baroko, dum ĉe ni sur la konkerita teritorio ĉesis la Eŭropa evoluo, transdonante la lokon al mondo tute fremda laŭ moro, religio, mondpercepto kaj ekonomiaj rilatoj. La turkoj ne volonte permesis al la hungaraj enloĝantoj eĉ la restaŭradon de la ekzistantaj konstruaĵoj kaj tute malpermesis la konstruon de novaj.



Urbo Pécs: Moskeo kaj minareto paŝao Jakovali Hasan

Urbo Pécs: Moskeo de paŝao Gazi Kasim



Malgraŭ la longa daŭro de la turka regado, inter la du nacioj ne povis elkreski pli intensa kontakto. La malamika atmosfero daŭris ĝisfine, la religia diferenco malebligis pliproksimiĝon de la popoloj de mondperceptoj tiom profunde fremdaj. La orienta arto ne povis disvolvi sian efikon; ĝuste pro tio, je fino de la fremda regado, la manifestiĝoj de la islama arto tiel rapide malaperis, kiel ili ekestis ĉe la komenco. Kelkaj preĝejoj (en urboj Pécs, Eger, Szigetvár), tombejmonumentoj (de derviŝo *Gül* en Buda kaj tiu de *Idris* en Pécs), minaretoj (Eger, Pécs, Szigetvár kaj Érd), derviŝolernejo (Szigetvár), banejoj en Budapest nomataj nun: Rudas, Rác aŭ sankta Emeriko, Király kaj fortikaĵmuroj el brikoj, kelkaj bastionoj en la okcidenta parto de fortikaĵo en Buda, fortikaĵpartoj en Szigetvár, — jen estas ĉio, kio restis ĉe ni ĝis hodiaŭ kiel memoraĵoj el la turka epoko.

La mahometanoj estis religiemaj homoj. Por ili estis gravaj la preĝejoj, kie ili aŭskultis la vendredvesperan preĝon kaj predikon. Tamen anstataŭ konstrui novajn preĝejojn, ili unuavice utiligis la jam ekzistantajn kristanajn preĝejojn, kiujn ili aliformigis konvene al siaj bezonoj. Unue ili forigis la

statuojn de la sanktuloj, ĉar la Korano malpermesas la figuradon de la homaj estuloj. El la sama kaŭzo ili malaperigis la bildojn (laŭ ili „idolojn") de sur la muroj per helpo de mortero kaj kalko. Superfluaj iĝis ankaŭ la benkoj en la navo, ĉar la „veraj kreduloj" preĝas starante aŭ sidante sur tero. Grava estis la preskribo rigardi en direkto de sankta urbo Mekko. Plifaciligis la ĝustan orientiĝon, ke la turkaj preĝejoj en sia sudorienta muro havas ogivan kavon, tiel nomatan preĝoniĉon (turke: *mihrab).* Starante fronte al la niĉo, la muzulmano jam plenumis la preskribon. Vi povas vidi tian preĝoniĉon ankaŭ en Budapeŝto, en la Internurba Preĝejo, kies konstruaĵon la turkoj uzis siatempe kiel moskeon.

Islamo ne konas preĝejturon, nek sonorigadon. La turon anstataŭas la minareto, kaj la sonorigadon la kanto de muezino, kiu tage kvinfoje supreniras la rondan balkonon de la minareto kaj turnante sin al la kvar direktoj de la mondo alvokas la verkredulojn: „Ne ekzistas pli ol unu Dio, Dio estas senlime potenca, venu do, adoru lin. La preĝo estas pli dolĉa ol la sonĝo, ek al la preĝo, ek al la feliĉo".

La islama arkitekturo estis nediskuteble altkvalita en sia propra patrio, tamen sur la hungara tero, kiel en konkerita provinco, la venkintoj kontentiĝis je monumentoj jam de malpli alta artisma valoro. Laŭdinda escepto estis la minareto de Eger, kies artisman valoron niaj fakspertuloj rekonas sendiskute. Mankas jam la minareto apud la impona preĝejo de paŝao Gazi Kasim, sed ĝin havas eĉ nun la alia turka preĝejo (tiu de Jakovali Hasan) ambaŭ en Pécs. Nun oni finis la restaŭradon de minareto en malnova vilaĝo Érd en proksimo de Budapeŝto. Longe staris el ĝi nur unu etaĝo, sed nun oni komplete restarigis ĝin fakfidele por servi didaktikan celon. Nur la malsupra parto de la originala minareto estas videbla en la urbo Szigetvár.

La du preĝejoj restantaj en Pécs bone montras la karakterizan turkan-islaman konstrustilon. Sur kvadrata bazo leviĝas la muroj, poste sekvas la okangula mur-tamburo, kiun kovras la impona kupolo ornamita ĉepinte per signo de duonluno. Ĉe la transiro de la ĉefaj muroj al la okangula tamburo troviĝas la stalaktitoj (ĉelo-konzoloj) bone videblaj en la interno de la preĝejo. Ili estas karakteriziloj de la islama konstruarto, same kiel la supraj arkoj ĉe la pordoj kaj fenestroj. Tiuj arkoj imitas la profilon de sekco de azenodorso, distingiĝas do de la ogivo gotika kaj intense emfazas la orientan karakteron.

Se la urbo Pécs estas riĉa koncerne la turkajn ekleziajn memoraĵojn, la samon ni rajtas aserti pri nia ĉefurbo koncerne la turkajn banejojn. El ĉi tiuj kelkaj eĉ hodiaŭ funkcias. Rekomendinde estas ĝui la termal-akvon de la iama „verdkolona" turka banejo, hodiaŭ nomata „Rudas", kaj viziti la alian, nomatan „Király", kiu povas servi ankaŭ kiel pitoreska fotoobjekto. En la banejo „Rudas", ĉe piedo de monto Gerardo (Gellért) troviĝas originala okangula turka baseno ĉirkaŭata de ok kolonoj, kiuj pere de ogivoj tenas la duongloban kupolon.

Budapeŝto: Turka banejo „Király"

Trista periodo estis por la hungararo la 16a kaj 17a jarcentoj, tamen ni aprecas la artmonumentojn, eĉ se iliaj kreantoj estis malamikoj de la hungara popolo. Tiuj artobjektoj apartenas ja al la hungara historio, kies estimo estas nia nobla devo.

Jozefo Mátéffy

Filmoj pri Hungarlando

En la jaro de la Budapeŝta Kultur-festivalo certe multaj el niaj legantoj, partoprenontaj aŭ ne la festivalon, volonte rigardus informajn filmojn pri hungaraj regionoj. Nu, tiaj nun estas prezentataj diverslande. Ekzemple, post la jam sukcesa filmo de „Manĝreceptoj", la nova kolora filmo „Manĝfilmoj" estas montrata en la filmstudio de la Vue Touristique, internacia organizo de turismaj verkistoj kaj ĵurnalistoj. Ĝi estas videbla en diverslandaj fremdultrafikaj oficejoj. Nun oni filmas la fruktojn de Hungarlando kaj la plej famajn vinber-regionojn hungarajn. Interesa estas la temo de kolorfilmo 16 milimetra: sur ĝi videblas turista grupo vizitanta la plej karakterizajn pejzaĝojn de la lando kaj gustumanta la plej aromajn fruktojn, kaj la vinojn, brandojn pretigitajn el tiuj.

En la regionoj de Tokaj kaj Eger kaj borde de la lago Balatono pretiĝas la filmo: „Vino kaj vin-regionoj". Ĝi montras ne nur pitoreskajn pejzaĝojn, sed ankaŭ festojn de vinrikolto, eĉ konkurson de vin-trinko. Oni povas vidi la sekretojn, kiel oni pretigas bonan vinon kaj dume plezuri pri la buntaj popolkostumoj de la regiono. Multaj eksterlandaj turismaj oficejoj interesiĝas pri la filmo „Florkulturo en Hungarlando", kiu, krom belegaj parkoj kondukas la spektantojn en mondfamajn botanikajn ĝardenojn, arbar- kaj kanejrezervejojn. Krom la granduzinaj ĝardenkultivejoj oni vidas ankaŭ kolorajn scenojn el la florkarnavalo de la urbo Debrecen. Plezuriga montreblaĵo ĉe diverslandaj kunvenoj kaj aranĝaĵoj E-aj.

P. B.

Siberia humuro

Ĉu fakte Siberia? La alsendinto, *S. V. Filippov,* mem kontestas tion, skribante en la almetita letero, ke ĉi-samajn anekdotojn oni trovis en la manoj de faraona mumio, vivinta 5000 jarojn a.K.

Post kelka kaporompo ni divenis, ke li volis per tio diri, ke la anekdotoj estas tre malnovaj. Nu, ĉi-koncerne ni tenas nin al la moto de hungara humuraĵ-gazeto, laŭ kiu „Ne ekzistas malnovaj humuraĵoj, nur aĝaj homoj: por sucinfano ĉiu humuraĵo estas nova". Kaj nun jen tri el ili:

Novjare. En Novjara mateno la edzo venas hejmen pli ol iom ebria. Je lia sonorilsignalo, lia edzino, armita per pato, malfermas la pordon, forte batas al la edzo la kapon kaj demandas:

— Ĉu vi drinkos plu?

La edzo nur palpebrumadas. Nova kapobato kun la demando:

— Ĉu vi drinkos plu?

La edzo falas surgenuen, ion murmurante. Sekvas la tria kapobato:

— Ĉu vi drinkos plu?

Falinta sur la plankon, la malfeliĉa edzo stultridete svingas la manon kaj diras:

— Verŝu, do!

Novjare ankaŭ alia edzino atendas sian edzon, Miĉjon. Ne malŝlosante la pordon — multaj ebriuloj vagas en tia nokto —, ŝi demandas elinterne:

— Ĉu estas vi, Miĉjo?

Nenia respondo. Post iom da atendo, la edzino foriras de la pordo. Rea sonorilsignalo. Ŝi rerapidas al la pordo:

— Ĉu estas vi, Miĉjo?

Plena silento. Ŝi kuŝiĝas, jam preskaŭ ekdormas, kiam triafoje eksonas la sonorileto.

— Ĉu venis vi, Miĉjo, respondu!

Nenia eĥo. La virino kolere enlitiĝas kaj ekdormas. Tamen, ŝia dormo estis maltrankvila, kaj tuj post tagiĝo ŝi iras serĉi sian Miĉjon. Kaj jen antaŭ la pordo ŝi vidas sian edzon, kurbiĝintan kiel kringo, dormi sur apudporda tapiŝeto.

— Miĉjo, Miĉjo, kial do vi ne respondis nokte? Mi vin demandis ja trifoje!

— Sed mi jesis ja per la kapo...

Eraro. — Panjo, demandas la eta Peĉjo, ĉu la riboj havas piedetojn?

— Ne, fileto!

— Ho, tiam mi manĝis kokcinelon.

Lingvokono. La muso ĉasata de kato rifuĝis en sian truon. Post longa vana atendo ĉe la truo, al la kato venis genia penso: ĝi ekbojis hunde. La muso, ekaŭdante la bojon, pensis, ke kie estas hundo, tie ne povas esti kato kaj forlasis sian neston. La kato, ĝin manĝante, diris:

— Kiel utile estas en nia epoko koni fremdajn lingvojn!

Sveda gasto en nia libro-vendejo

— Ĉu vi scias, kia surprizo estas al mi trovi en via belega urbo E-an librovendejon? Eĉ imagi mi ne povis, ke ekzistas vendejo, kie oni vendas nur esperantaĵojn, kie oni estas salutata kaj servata E-lingve. Kaj ankaŭ la aliaj aĉetantoj parolas E-lingve. „Ne kredeble" — diros miaj samideanoj hejme. Nur hezite ni vizitas vendejon fremdlande, ĉar plej ofte tio estas ligita kun lingvaj malhelpoj. Nun mi sentas min kvazaŭ veninta en Esperantujon. Mi scias, ke vialande multaj E-aj libroj iam estis eldonitaj, sed nun mi scivolas pri tio, kiaj hungaraj eldonaĵoj estas nun riceveblaj.

— Laŭ via plaĉo. Jen la mondfama „La Tragedio de la Homo", en la modela traduko de *K. Kalocsay:* bonaspekta, bele bindita libro. Sed certe vi dezirus vidi novajn eldonaĵojn. Jen la libro „Amo kaj Libero", riĉa kolekto el la poemoj de *Petőfi.* Ankaŭ ĝin tradukis *K. Kalocsay.* Neniam mi kredus, ke oni povas tiel redoni ne nur la vortojn, sed ankaŭ la senton, la facilecon kaj la etoson de la Petőfi-poemoj. Ĉi-jare aperis ankaŭ „La sep reĝidoj", fabelo de *B. Balázs,* tradukita de nia bone konata iama radio-parolistino *Éva Farkas.* Kiel bele ŝi parolas, tiel bele ŝi tradukas. La libro estas ne nur legaĵo, sed, kun siaj desegnaĵoj koloraj, juvelo por ĉiu kolektanto. — Jena poŝlibreto — studenta korespondado de *Kaszap—Benczik* — aperis antaŭ kelkaj semajnoj: jam delonge bezonata helpilo por komencantoj. Haveblaj estas ankaŭ libroj eldonitaj antaŭ kelkaj jaroj. Jen la „Ora Duopo", jubilea libro pri Baghy kaj Kalocsay okaze de ilia sepdek-kvin-jariĝo. Nemultaj estas, kiuj ĝin ne posedas, sed ĝi estas bela donaco por novaj adeptoj. — Freŝa hungara romano el la lasta jardeko, havanta grandan sukceson ankaŭ kiel filmo, estas „Dudek horoj" de *Ferenc Sánta,* prezentanta la konfliktojn de la hungara vilaĝo antaŭ, dum kaj post la perturboj en 1956 kun la sincero kaj kunsento de humanisto. — Ankaŭ „krimio" ne mankas: „Patromurdo en la nigra muelejo" estas la iom hororiga titolo de libreto de I. *Ráth—Végh,* tradukita de *M. Benczik.* — El la lernolibroj menciindas antaŭ ĉio la „Gvidlibro" de Pechán mondkonata kaj uzata libro por ekzamenotoj de superaj kursoj, donanta bonan trarigardon pri la E-a historio, movado kaj literaturo. Ĝin kompletigas la Gramatika Demandaro de J. Baghy. La Hungara-Ea kaj Ea-Hungara vortaroj kaj la Turista Vortaro de Pechan estas tiel same haveblaj. — Por lernejanoj ni rekomendas la lernolibron ESPERANTO I. de Szerdahelyi. Kun sia bona teksto kaj belaj ilustraĵoj ĝi estas ŝatata kaj de lernantoj kaj de pegadogoj. Por daŭrigaj kursoj servas ESPERANTO II., ŝajne la libro de futuro por la lernejoj en la tuta mondo. — Tiel same por infanoj pretiĝis la belega, kolore ilustrita libro: Ĉu ankaŭ vi scias?" de E. Janikovski. — Kantlibron eldonis la tre aktiva junulara grupo el Pécs; la titolo, ĉar ilia klubo hejmas laŭmode en kelo — estas: „Kel-amikoj kantas". — Nu, kaj — malpli alte, ni havas ankoraŭ esperantaĵojn: kovertojn, leterpaperojn, kartojn, insignojn, glumarkojn en nia stoko.

— Vere, la trarigardo de viaj libroj estis por mi granda plezuro.

J. Dévai



DIGITAL FREQUENCY METER

La digitala frekvencometro[1] — konstruita el integraj cirkvitoj — estas oportune uzebla sur ĉiu tereno de la elektronika industrio. Pro sia granda precizeco kaj stabileco ĝi estas tre fidinda. Ĝia interna tempobazgeneratoro estas oscilatoro metita en termostaton. La mezuritan valoron ĝi elskribas helpe de cifertuboj kun sep-cifera precizo, kaj samtempe, en formo de paralela BCD-kodo,[2] transmetas tiun sur plurkontaktan kontaktilon por ebligi fiksadon sur nombropresilo. Nia aparato de tipo PRINTER DRIVER TR-5350/DO10 adaptas la elirantajn signojn al la nombropresilo de tipo *Messwertdrucker* 3534/a, fabrikita en GDR.

Nia kooperativo fabrikas tiun aparaton en kvar variaĵoj:

Tipoj funkciigeblaj el baterio:

10 MHz DIGITAL FREQUENCY METER (TR—5255/DOO4)
25 MHz DIGITAL FREQUENCY METER (TR—5258/DOO9)

Tipoj funkciigeblaj el baterio:

10 MHz DIGITAL FREQUENCY METER (TR—5256/DOO8)
25 MHz DIGITAL FREQUENCY METER (TR—5261/DO11)

La principa kaj struktura konstruado de ĉiuj kvar aparatoj estas identa.

FUNKCIIGAJ MANIEROJ

1. *Frekvenco-mezurado.* La mezurita valoro sin montras en Hz aŭ kHz. 2. *Mezuro de mezvalorigita periodotempo.* Ĉe malalta frekvenco la mezurlimo estas pliigebla, se oni transiras al tempmezurado. La proporcio de mezvalorigo estas: 10, 100 aŭ 1000, depende de la mezurlimo. 3. *Nombrado de okazaĵoj.* La aparato kontinue nombras la impulsojn donitajn al ĝia enir-kontaktejo, 4. *Testo.* En ĉi tiu funkcio-maniero la aparato kontrolas la ĝustecon de sia propra funkciado.

TEKNIKAJ INDIKOJ

Enira rezistanco	1 MOmo
Sentiveco	50 mV
Stabileco	1×10^{-6}/jaro
Ekstera tempobaz-eniro	1 kHz . . . . 10 MHz
Elskribo	per 7 cifertuboj
Frekvenc-mezurado:	
mezurintervalo	ĉe tipoj DOO4 kaj DOO8 2 Hz . . . 10 MHz ĉe tipoj DOO9 kaj DO11 2 Hz . . . 25 MHz
precizeco	precizeco de tempobazo: ±1 cifero, Hz aŭ kHz
lego laŭ unito	
Mezuro de mezvalorigita periodotempo:	
mezurintervalo	μ sek . . . 0,5 sek
mezvalorigo	por periodoj 10, 100 aŭ 1000
lego laŭ unito	μ sek aŭ msek
precizeco	precizeco de tempobazo: ±1 cifero, ± malprecizeco de starto
Ĝeneralaj indikoj:	
funkciodaŭro	la aparato estas uzebla por konstanta funkciado
nombro de transistoroj	ĉe tipoj DOO4 kaj DOO9 29 pecoj da siliciotransistoroj ĉe tipoj DOO8 kaj DO11 33 pecoj
nombro de diodoj	ĉe tipoj DOO4 kaj DOO9 17 + 3 pecoj Gretz, ĉe tipoj DOO8 kaj DO11 17 + 3 pecoj Graetz
nombro de integraj cirkvitoj	31 pecoj da TTL-cirkvitoj
linearo (DOO4 kaj DOO9)	110, 127, 220, kaj 240 V 50/60 Hz; ±10%
nominala bateritensio (DO08 kaj DO11)	12,6 V (sen alteriga kontakto), permesita ŝanceliĝo: —10 . . . + +15%
limo de registrigebla povumo	ĉe tipoj DOO4 kaj DOO9 ĉ. 20 VA ĉe tipoj DOO8 kaj DO11 ĉ. 30 W
Dimensioj	larĝo: 279 mm, alto: 112 mm, profundo: 191 mm
Pezo	ĉ. 3,5 kg

La aparaton fabrikas TELEKOMUNIKA KOOPERATIVO (Budapeŝto, VII. Csengery u. 28.). En Hungario vendas ĝin MIGÉRT (Budapeŝto, VI. Népköztársaság útja 2.), — en eksterlando METRIMPEX Entrepreno por Internacia Komerco (Budapeŝto, V. Münnich F. u. 21.).

1. Digitala: la rezulton, mezuritan per elektronika tekniko, ĝi montras per ciferoj.
2. BCD: Binare Kodita Decimala.

Sekretoj de virinaj nomoj

Se junulo enamiĝinta flustrus al la amata junulino: „Mia kara Ursulineto" aŭ „Amata Renaskita" aŭ eĉ „Mia kara Bovino" aŭ se nia poeto K. Piĉ kantus: „Mi vin amas, Terkultura", tio plie longigus la nazeton de la karinjo ol flati al ŝiaj oreloj. Tamen, sonus nur E-lingve ilia nomo: *Ursula, Renata, Lea, Georga* aŭ *Georgina.*

Waringhien, en sia „Lingvo kaj Vivo", en ties unua interludo, jam pritraktis la originon de pluraj virinaj nomoj, kun familiopatra jovialeco kaj inter multaj klopodoj pro sia pipo (cetere, li tute ne fumas tabakon, miascie). Ĉi tie do mi nur postrikoltas iomete.

Ne ĉiuj nomoj estas tiel danĝeraj kiel la supre-nomitaj: multajn oni povas senskrupule flustri ankaŭ en ilia traduka formo. Tiaj estas la flordevenaj nomoj: *Roza, Viola, Violeta, Flora,* kaj ankaŭ *Suzana,* kvankam komprenita plursence: lotuso, anemono, lilio. Ankaŭ *Stefana, Stefania* kaj *Paŭla, Paŭlina* ne bezonas honti pri la signifo de sia nomo: *Florkrona* kaj *Etulino.* Kaj tiu edzo, kies edzino estas *Margareta,* havas en ŝi veran *Perlon,* sed se li taksas ŝin malpli valora, li povas ŝin nomi *Margerita,* kiu signifas nur *Astero.* Malpli detronigeblaj estas *Ĉarlota, Karlota, Karola;* ili estas laŭ sia nomo *princinoj* servendaj kaj obeendaj. *Helena* estas *torĉo:* ŝi estas brile lumanta, sed ankaŭ bruliga: pro ŝi pereis per flamoj la tuta Trojo.

La virinoj nomataj *Tereza* povas fieri pri la mistera neklarigiteco de sia nomo. Ĝi povas deveni el la greka *tharseleos* (kuraĝa), *tharsesis* (fido), *theristria* (rikoltistino), *thereusis* (ĉasa predo), kaj ankaŭ el la nomo de la insulo *There,* unu el la Sporadoj, nun *Santorin,* iam fama pri siaj Bakho-festoj, tiel ke oni nomis *theraikon* la buntan veston portatan tiaokaze. Do: *Kuraĝa, Fidinda, Ĉasinda, Rikolta, Bakĥo-festa* — bonvolu elekti.

Ni prenu la tre ŝatatan nomon *Katarina.* Miascie, ĝin formis la grekoj el ia praegipta nomo kun la formo *Aeikatarina,* kiu por ili signifis *Ĉiampura* („aei" = ĉiam; katharos = pura). La originan formon konservis la rusa lingvo en *Jekaterina.* Sed tiel populara nomo ne povis eviti transformiĝojn dorlotajn: en la hungara ĝi fariĝis *Kata, Kati, Katica,* en la rusa lingvo *Katja, Katjuŝa.* Ĉi lasta estis ankaŭ karesnomo de la timiga raketseriojetilo de la soveta armeo; se oni pensas pri ĝia eksterma efiko, oni inklinas akcepti la supozon de *Waringhien,* ke la nomo originas de *Hekata,* la inferdiino. Sed ankaŭ alian metamorfozon suferis tiu nomo, tian, ke apenaŭ mi kuraĝas ĝin malkaŝi al la Katarinaj. En pluraj slavaj lingvoj (ĉeha, pola, slovaka) ĝi alprenis la karesan formon *Kaĉa* kaj signifas „anaso". Ankaŭ la hungara lingvo adoptis tiun vorton, tiel ke ĝi maloftigis la uzon de la samsignifaj *rece* kaj *ruca.* Oni povas rompi al si la kapon, kiamaniere tiu karesformo ricevis tian signifon. Ĉu eble pro la anasmaniera paŝado de la gravedaj junedzinoj? Ree mi petas pardonon, sinjorinoj Katarinaj.

Unu el la plej ofte uzataj nomoj estas *Maria,* kies hebrea formo en la Malnova Testamento estas *Mirjam,* en la greka teksto de la Nova Testamento *Mariam, Maria.* Oni renkontas ankaŭ la formon *Mariana,* kaj ĉi tiu, pli ĝuste *Mariamna* estis, laŭ Waringhien, la origina formo, kaj signifis *Amata de* (dio) *Amono,* sekve ĝi estis praegipta nomo. Kiel ĉiu ofta nomo, ankaŭ *Maria* havas multajn karesformojn, el la hungara mi citu *Mari, Marika, Mariska, Marĉa, Maca;* ĉi lasta fariĝis ankaŭ komuna nomo kun la signifo „amantino". En pluraj slavaj lingvoj, kaj ankaŭ en la hungara, naskiĝis ankaŭ la karesformo *Maĉka,* sed ĝi apenaŭ estas uzata kiel persona nomo: ĝia signifo estas *kato.* Ree mi devas peti pardonon, sed ĝi estas certe pli tolerebla sencuzurpo ol Kaĉa = anaso; por francoj „kateca virino" sonas kiel komplimento.

Zs. Gyarmathy

LA LERNANTARO, NIA ESTONTECO, BEZONAS LEGAĴON

La venko de E-o grandparte dependas de la nombro de ĝiaj adeptoj. Ju pli granda estas tiu nombro, des pli la esperantistaro povas funkcii kiel „premgrupo", efikanta sur la registarojn por la oficialigo de E-o.

En la kreskigo de la adeptonombro plej multe povas fari, sendube, la instruistaro; ĉi-flanke oni jam multloke faris la komencajn paŝojn. Sed la alia nepre necesa faktoro estas la E-a lernantaro; jen por kiu ni faris ĝis nun preskaŭ nenion.

Fakte, en la manojn de la lernantoj ni povas doni, krom la lernolibroj, tre malmulton. La unuaj entuziasmaj varbovortoj post nelonge paliĝas, forgesiĝas, ĉar la praktikan utilon de E-o la lernanto vidas antaŭ si nur en la fora futuro. Korespondado prosperas nur malofte, kaj se jes, sur plorinde malalta nivelo. Vojaĝi eksterlanden povas nur monhavaj homoj, sed la kursanoj plejparte ne estas riĉaj: krome, ni ne forgesu, ke E-o estas lingvo pli skriba ol parola.

Sed kion scias legi la lernantoj? Apenaŭ ion. Niaj gazetoj, niaj eldonaĵoj por ili estas tro malfacilaj. Sekve, se ni volas kunteni la varbitojn, eĉ allogi novajn, necesas urĝe doni al ili konvenan literaturon.

Tio estas ilia minimuma „porvivaĵo". Ĝi estas efektivigebla per revuo, internacia laŭ redakcio kaj enhavo, por lernejanoj 12- ĝis 16-jaraj.

La ideo mem ne estas nova: la francoj, en la 30-aj jaroj, redaktis la revuon „Infanoj sur Tutmondo", altnivelan laŭ la tiamaj cirkonstancoj. Ĝi renaskiĝis en mi antaŭ pluraj jaroj, kaj ĝia projekto, kompletigita per valoraj proponoj de multaj kompetentuloj, estis aprobita de la konferenco de ILEI (27—30/VII. 1971), kiu samtempe komisiis min fari konkretajn paŝojn al la realigo. Sed mi ne volas eniri detalojn; gravas, ke ni intencas eldoni, kun la titolo KASTORO, revuon forme kaj enhave altkvalitan.

Ĉiu ĝia numero prezentos iun landon de la mondo, rakonton aŭ fabelon, poemeton, bildnovelon, kanton, ludon en- aŭ eksterklasan, enigmon, faman ensemblon de dancmuziko, interesaĵojn el la mondo, humuron kaj precipe mozaikon el la vivo de la junaj gelernantoj-esperantistoj. Ĉio ĉi doniĝos tra multaj karikaturoj, desegnoj, fotoj, kaj en ĝismaksimume simpla lingvo. La revuo uzos, inkluzive tabelvortojn, prefiksojn, prepoziciojn, ne pli ol mil radikojn; ĉiuj ceteraj, neniel eviteblaj, estos difinitaj per la elektitaj vortoj, piednote. Ni klopodos aldoni aparte, malmultekoste en po tri naciaj lingvoj, tiun bazan vortareton, nomatan KASTORA ŜLOSILO, kaj enmanigi ĝin al ĉiu leganto. Tiamaniere ni atingos, ke post unu-du jaroj da lernado vere ĉiu komencanto povos utiligi la akiritan lingvokonon.

KASTORO do deziras esti fundamenta eldonaĵo por la venanta generacio. Kaj, se ni agos prudente, ĝi povos fariĝi epokfara instruilo kaj konservilo, edukanta milojn da energiaj „premgrupanoj".

Dum la ekzisto de E-o, Hungario pli ol unufoje donis apostolojn al la „Verda Espero", kaj mi fidas, ke miaj samlandanoj denove faros sian eblon.

Detaloj aperos ankoraŭ en postaj numeroj.

Géza Kurucz
lingvo-profesoro
komisiita redaktonto de KASTORO

Tri miraklo de Sankta Antonio

Vizitante Romon kun mia edzino, ni estis jam lacaj de la multaj vidindaĵoj, sed eĉ pli ol la laco nin premis, ke nia mono malmultiĝadis kun danĝera rapideco. Tial, antaŭ iu statuo de Sankta Antonio, mia edzino diris reflekse:

— Se nur Antonio nin helpus per iom da itala mono. Tiam ni povus ankoraŭ restadi kelkajn tagojn.

Poste ni veturis sur aŭtobuso plenplena. Apud ni abrupte eksplodis laŭta disputo, kaj fine du detektivoj kaptis kaj prenis kun si viron kaj virinon; apud ili kolere gestadis eksterlandano. Veninte en nian hotelan ĉambron, kiam mi demetis la surtuton, mi tuŝis en ties poŝo ion duran. Kia surprizo! Ĝi estis monpaperujo kun terure multa mono.

— Ni devas ĝin redoni — diris mia edzino.

— Al kiu?

— Al la polico.

— Se la damaĝito sin ne anoncos, ĝin havos la itala fisko.

Tamen, la sekvan tagon ni portis la monon al la polico. Oni faris protokolon helpe de interpretisto kaj forprenis nian pasporton, dirante, ke provizore ni ne rajtas forvojaĝi.

— Vi vidos, ke oni fine enkarcerigos nin — mi diris riproĉe al mia edzino.

Post duonhoro la policoficiro nin vokigis kaj apud li mire ni rekonis la eksterlandanon, kiu gestadis en la aŭtobuso. Li dankis angle kaj premadis mian manon, kiam la policoficiro ekparolis:

— Sinjoro Ramsay, ne forgesu, ke laŭleĝe vi devas doni gratifikon al la honesta retrovinto...

Ni restis do ankoraŭ kelkajn tagojn kaj por mia edzino mi aĉetis paron de oraj orelringoj.

La belaj tagoj forpasis en Italio, ni veturis jam hejmen en varmega vagono kaj, manĝinte hungaran salamon, ni estis tre soifaj. La gratifiko de Sankta Antonio jam fordegelis. Ĉe la stacidomo de Ferrara du virinoj envenis la kupeon. Unu apogadis la alian, kies kruroj kaj brakoj estis pansitaj.

— Kio okazis? — mi demandis.

— Ho! — lamentis la virino. Sankta Antonio de Padovo nin helpis... Aŭto min surveturis... sed restis al mi la vivo... eĉ osto al mi ne rompiĝis. Mi devos rekompenci al Sankta Antonio tiun helpon, tuj kiam ni hejmenvenos al Padovo... jam la sekvanta haltejo.

Sed ni havis ankoraŭ unu horon ĝis Padovo kaj komencis babiladon. La pansita virino montriĝis tre scivolema kaj vortrapida, ŝajnis tute forgesi la vundojn kaj ofte ridis, kiam mi torturadis la italan lingvon.

— El kiu lando?... Ĉu ŝi estas via edzino?... Kiel al vi plaĉis Italio? De kiam vi estas ĉe ni?... Kial vi ne restos plu?

Mi montris mian malplenan monujon. Je tio, ambaŭ virinoj ridis, kaj parole-mane nin invitis al Padovo, gasti ĉe ili kelkajn tagojn, honore al Sankta Antonio.

Dume, la vundita virino trafoliumis prospekton pri Romo, kuŝantan sur la apudfenestra tableto kaj ŝovis en ĝin ion. Post kiam ili elvagoniĝis en Padovo, mi tuj trarigardis la prospekton kaj trovis en ĝi 5000 lirojn. Mi elrigardis tra la fenestro, sed nenie vidis la damojn. Post nelonge mi jam trinkis bieron kaj mia edzino limonadon.

La tria miraklo devus okazi en Budapeŝto. Mi vizitis, nome, plaĝbanejon kun mia edzino. Forlasinte la banejon mi rimarkis, ke el la dekstra orelo de mia edzino perdiĝis la orelringo. De tiam hejme mi ofte malfermas la belan orelringan skatolon kaj rigardas la orfan orelringon, atendante la trian miraklofaron de Sankta Antonio.

Szilárd Bálint

NIAJ LANDAJ ZORGOJ

Laboruldefendo. „Népszabadság"* raportas pri tio, ke la tn. profesiaj malsanoj, laŭ statistikoj, malpliiĝas ne nur en la ĉefurbo, sed ankaŭ en aliaj regionoj de la lando. La artikolo de *T. Kéri* tamen avertas: la „favoraj" indikoj estas ne etparte dankeblaj al manipulado de tiu aŭ alia entrepreno. Plurloke ne multon oni faras por la preventado. En unu fabriko, ekz-e oni disdonis al la laboristoj solvilon kun kemia kombinaĵo nekonata, kaj ĉi tiu solvis la gumgantojn kaj mordis ĝissange la manojn de la laborantoj.

Kontraŭ tiaj fortimigaj ekzemploj troviĝas ankaŭ imitindaj modeloj. Somere en la ŝtatmastrumaĵoj pli kaj pli oftis la sunombreloj metitaj sur la kombajnon kaj multloke oni surverŝis per akvo ĉiuhore la varmegiĝintajn ferkonsistaĵojn de la maŝino. En la ferindustrio kaj aliaj „varmaj" uzinoj oni jam aplikas la specialajn ŝirmvestojn tegitajn per aluminio-pigmento reflektanta la varmoradiojn; ĝin oni ellaboris en la Laboruldefenda Esplor-instituto de la Sindikata Konsilio. La Nitrogenuzino en Pécs malpliigis la bruon per bru-izolaj muroj, la varmegon per ventol-instalaĵoj: jare preskaŭ duonmilionon da forintoj oni elspezas por esploroj pri la plibonigo de la laborkondiĉoj.

La artikolo rimarkigas, ke ne sufiĉas disponigi la sanajn laborkondiĉojn sen la observo de la preventpreskriboj. En la postulo de tiu observo fare de la laborantoj kaj ankaŭ en la priinstruo de la laborularo, la magistratojn, societajn organojn, laborlokajn gvidantojn, laboruldefendajn inspektorojn ŝarĝas eksterordinare grava kaj responsa devo.

Nehungaraj gentoj. Slovakoj, rumanoj, serboj, germanoj: kvar gentoj vivas kune kun hungaroj en 16 vilaĝoj aŭ urbetoj de la departamento *Békés.* Ili vivas kaj laboras en plena kontento. La artikolo de Á. Pünkösti en „Népszabadság" ĝoje registras, ke en Battonya la surskriboj estas trilingvaj kaj en aliaj lokoj (Szarvas, Nagybánhegyes, Tótkomlós) la surskriboj de la publikaj konstruaĵoj montras dulingve, ke ili servas loĝantaron dulingvan.

Tamen, en ses vilaĝoj la konsilio decidis tiel, ke ili ne aplikos dulingvajn surskribojn. Motivado: la loĝantaro ne deziras tion, eĉ rigardas tion superflua, ĉar ili maksimume parolas, sed ne legas-skribas sian gentan lingvon.

Ĉi tiu opinio estas fantomo el la pasinto, el kiu devenas la diro: „esti ano de fremda gento neniam estas merito, sed povas esti kulpo". Okazas eĉ, ke multaj ĉe la popolnombrado deklaras sin hungaroj, kvankam ili laŭ siaj moroj, kantoj, patrina lingvo estas nehungaroj.

Sed se la homoj el tiuj ses vilaĝoj aplaŭdas la germanajn, rumanajn aŭ slovakajn programojn de iu loka popola ensemblo — kaj oni faras ja tion — tiam, eĉ se komence nur malfacile ili elliterumos la surskribojn en sia patrina lingvo, poste ili laŭdos la gvidantojn de la vilaĝo, ke ilia filo aŭ nepo atingis pli ol ili mem: li jam flue legas la lingvon de la avoj. Ĉar tiuj gentlingvaj surskriboj estas ankaŭ instigoj por bona animstato, por konscie kaj fiere konfesebla gent-aparteneco.

— *kvk* —

*„Népszabadság" (Popollibero) estas la oficiala gazeto de la Hungara Socialisma Laborista Partio.

Niaj legantoj skribas

„Mi estas komencantino kaj por perfektigi mian scipovon en nia internacia lingvo Esperanto mi abonis vian revuon Hungara Vivo. Ĝi tre plaĉas al mi ĉiurilate. Hodiaŭ jam mi provis solvi la enigmon... Amike salutas — Erika Schulz, (27) Schwerin (Meckl. Hagenower str. 16. *DDR.*"

„Denove mi havis la grandan ĝojon tralegi tre intereskaptan numeron de HV. Multe da esperantistoj nur babilaĉas pri la perfekta funkcio de nia mondlingvo, sed kiel aspektas la praktikado de iaj „grandbrustaj" deklamantoj? Nu, se ekzistus en la hodiaŭa mondo esperantlingvaj publikaĵoj de la tipo Hungara Vivo, neniam oni povus akuzi la esperantistaron, ke ekzistas abismo inter vortoj kaj agoj...

Karaj kulturamikoj, veraj amikoj de sciindaĵoj ekster via propra patrujo: ne nur legu Hungaran Vivon, sed ankaŭ varbu novajn legantojn de tia karega kulturrevuo! Pri tia malgranda, sed kulture granda nacio, kiel Hungario, oni certe malmulton informas en nacilingvaj informorganoj. Longe vivu HV! — Bertil Englund, Hagalundsg. 22. S—214 32 Malmö, *Svedio.*"

„Dank'al afabla helpo fare de s-no Lajos Tolnai, Riga Esperanto Klubo formis amikajn kontaktojn kun hungara E-klubo »Bányász« el Tokod-Altáró. Anoj de tiu klubo, krom sinceraj amikaj leteroj, sendas al nia klubo la revuon Hungara Vivo. Post komuna tralego ni transdonas ĝin al Riga Fremdlingva Biblioteko, kie funkcias la fako de Esperanto-libroj kaj revuoj... Saulcerite Neilande, Riga, 14, Glika 9—2, Latvio, *USSR.*"

„Ĉe amiko mi vidis numeron de la revuo Hungara Vivo, kaj ĝi plaĉis al mi. Volonte mi volas aboni ĝin... Ŝajnas al mi, ke vi tro malofte reklamas pri tiu revuo en aliaj Esperantaj gazetoj. Ĝi certe meritas pli da atento. Iam mi estis fidela abonanto de la mortinta Literatura Mondo. Kun sinceraj salutoj — Viktor Bonde, Stenslundsvägen 20, 79100 Falun, Svedio."

DE NEPROKSIME—TAMEN TEMPOGAJNE

vi povas aĉeti en la Loĝej-instala

MAGAZENO

DOMUS



Granda sortimento el
mebloj enlandaj kaj importitaj, tapiŝoj, kurtenoj, tablo- kaj starlampoj.
Malfermita: de la 10-a ĝis la 18-a, sabate inter la 10—15-a horoj

BUDAPEŜTO, XV., SIPOS DÉNES U. 9—11.

Alveturo: per aŭtobusoj de n-ro 25 kaj 70.

LETERKESTO

Nia redakcio ricevas multajn leterojn de legantoj, abonantoj el kvardek landoj, el kvin kontinentoj. Ni petas pardonon, se kelkfoje ni respondas nur malfrue, kaj se ni ne kapablas skribi respondleteron al ĉiuj.

En la lastaj tempoj sendis al Hungara Vivo gratulon, bondezirojn, opinion pri nia revuo; A Jaquel 29 bis, avenue J.—Valles, St— Martin-d' Heres- GRENOBLE, *Francio;* Bárta František Zilina, Gorkého sad 2, *Ĉeĥoslovakio;* Jozefo Lőrinczi, Miskolc, III., Vas u. 11 *Hungario;* Aleksandro Vajsberg, Murmanskaja obl. Monĉegozsk, Abonkesto 53; Viktoro Aroloviĉ, Moskvo V—338, Dm. Uljanova 5—141, *Sovetunio;* Ilse Neumann, *DDR* — 88 Zittau, Löbauer Strasse 14; Zdanek Hostomsky, Szabóova 8, Bratislava, *Ĉeĥoslovakio;* Jorma Ahomäki, sekretario de Esperanto-Asocio de *Finnlando;* Jiri Patera, MOST, Prubežná 1439—1, *Ĉeĥoslovakio.* — Ni dankas al ĉiuj tutkore, kaj esperas, ke ili restos sinceraj amikoj kaj diligentaj korespondantoj de HV.

Nun ni citas interesajn *fragmentojn* el kelkaj leteroj, espere, ke ĝi spegulas bone la kontakton inter legantojn kaj nia revuo.

„Tutkore mi gratulas pro la bela numero 3 de Via revuo, grandparte dediĉita al Kalocsay. Estas al mi ĉiam tre granda plezuro legi pri nia plej eminenta verkisto kaj, precipe, ĝui liajn originalajn eseojn aŭ tradukojn: vere, oni ĉiam lernas multe de li, kaj estas plejparte lia eksterordinara merito, se ni esperantistoj povas prave fieri pri nia literaturo kaj internacia kulturo... — D-ro Claudio Pontedera, Via Marco Polo 3/a, 37100 Verona, Instituto *Italiano* di Esperanto."

„...Mi tre, tre aprecas la tutan revuon. Mian specialan dankon al Lajos Tárkony pro „Revuo de revuoj"! Kia bona informado laŭ marksisma starpunkto! Kiam alvenas HV, mi flankenlasas ĉiun alian legaĵon! Fratece via Ludvig Schödl, Neuruppin, Rosa-Luxemburg str. 37. *DDR.*"

„Bonorde mi ricevis la numeron de la treege ŝatata revuo. Dankon. *Bedaŭrinde ĉi tiun ĝojon nur kvarfoje ni povas havi. Kiam vi povos aperigi la revuon almenaŭ dumonate?* Al mi plaĉas la tuta enhavo, sed precipe mi ŝatas la krucvort-enigmojn... Dankante denove la plezuron, kiun kaŭzas al mi la Hungara Vivo, mi salutas la tutan Redakcion elkore — Julio Szabó, Rumanio."

„Kun vera plezuro kaj eĉ aplaŭdo mi tralegis en Via ŝatata revuo la artikolon de Vilmos Benczik s. t. *Pensoj pri la Esperanta Literaturo.* Ĉar — kiel mi eksciis el la artikolo — »krom Hungara Vivo neniu E-revuo pagas honorarion.« — Mi proponas por la aŭtoro la duoblan honorarion, tiel trafe kaj senriproĉe li prezentis la nunan staton en la E-literaturo.

Mia ĝojo estas tiom pli granda, ke pasintaŭtune mi iniciatis perleteran diskuton kun s-ino Emilia Lapenna, sekretariino de Belartaj Konkursoj de UEA kaj V. Sadler, la redaktoro de *Esperanto,* ĝuste pri la E-literaturo kaj precipe Belartaj Konkursoj. Post kelkmonata interŝanĝo de leteroj, kiel kutime... »la montoj naskis muson«. Aperis nur malgranda fragmento de tiu diskuto en Esperanto, kiun Vi certe atentis. Estas do bonege, ke la artikolo de V. Benczik kontinuigas la aferon. Jes, vere, la Belartaj Konkursoj ne plenumas kontentige sian gravan rolon. Ili nur pritaksas kaj juĝas, kaj tio ne sufiĉas, se la konkursoj unu post la alia fiaskas...

V. Benczik do tute pravas dirinte: »Aktuale nia literaturo estas senmastra... Oni devas esplori la talentajn rezervojn... Ĉiu prokrasto kondukos al konsekvencoj doloraj.«

La revuo Hungara Vivo atingis jam tiel altan nivelon, ke ĝia opinio gravas en la E-rondoj, pro tio ĝi ĝuste faras manifestante sian vidpunkton pri tiel grava problemo, kiel la literaturo.

Korajn salutojn sendas Via konstanta leganto Wlodzimierz Zytynski, Kraków, ul. Mogilska 20 m. 7. *Pollando.*"

„...Mi abonas Vian revuon ekde pasinta jaro kaj ĉiam denove ĝojas pri la belaspektaj kajeroj, plenigitaj de faktoj, poezio kaj aliaj sciindaj aĵoj. Mi ne konas multe da Esperantaj gazetoj kaj revuoj, sed mi povas aserti, ke Hungara Vivo estas sendube la plej bona (eksteraĵe kaj interne) Esperanta organo, kiun mi vidis. Preskaŭ ĉiu paĝo estas interesa laŭ mia opinio. Ĉiu numero estas vere bona reklamo por nia Internacia Lingvo. Mi deziras al Vi ankoraŭ tre multajn tiel bonajn numerojn, kiel ĝis nun. Salutas Vin tre kore Via leganto Rainer Fischer, *DDR* — 50 Erfurt, Fritz-Büchner str. 19."

„Antaŭ unu monato mi ricevis la novan numeron de Hungara Vivo, kiun mi tuj tralegis... Mi devis konstati kaj bedaŭri, ke mi ankoraŭ ne pli frue abonis tiun interesan kaj informriĉan gazeton... Elkorajn salutojn sendas al vi via nova leganto Franz Peter Kurtz, *DDR* — 27 Schwerin, Obotritenring 211."

„...Ĉiam mi atendas Vian freŝan ekzempleron kaj *estus feliĉa, se ĝi pli ofte aperus.* Pleje interesas min la rakontoj kaj noveloj kaj ankaŭ la poemoj, ĉar el ili oni povas plej multe lerni. Krome mi trovas menciindaj la artikolojn de A. Münnich, de d-ro Szerdahelyi kaj la Teatran Kronikon. Dezirante al Vi multajn sukcesojn por kaj per Esperanto, mi restas Via fidela leganto — d-ro Martin Schüler, 1532 Kleinmachnow, Heidefeld 32, Germanio- *GDR.*"

„...Mi legas Vian revuon jam de tri jaroj kun granda intereso. Mi tre ŝatas ĝin pro la altnivela enhavo, kiel literaturo, arto kaj lingvistiko. Mi povas pliperfektigi min en la lingvo kaj mi lernas multajn novaĵojn el ĝi... Kun sinceraj salutojligitaj kun bondeziroj je la sukceso de HV Via — Frohmut Kaller, *DDR* 324 Haldensleben, Pfändegraben 6."

„Via gazeto al mi tre plaĉas. Eble vi povus skribi pli multe pri la muzeoj de via lando aŭ pri geografiaj temoj... Jürgen Berndt, 806 Dresden, Heldolandstr. 9 b. *DDR.*

Por ĉiuj partoj de la mondo akceptas la fabrikadon de

baletŝuoj

por piedpintado kaj ekzercigo,

popoldancaj botoj

kun mola kaj malmola kruringo, kaj diversaj

popoldancaj kostumoj

Kostumfabrikanta kaj pruntanta entrepreno

JELMEZKÉSZÍTŐ
ÉS KÖLCSÖNZŐ VÁLLALAT
BUDAPEST, V., BÉCSI U. 3—5.
HUNGARIO

Reprezentanto por internacia komerco:

Entrepreno Hungarofilm Vállalat

BUDAPEST, V.,
BÁTHORI U. 10.
HUNGARIO

RECENZO

Victor Sadler:
Memkritiko (Poemaro)
Eld.: KOKO, 1967.
17x13 cm. 60p. Tole bindita.

La nomo de la aŭtoro ne estas nova por iom informita esperantisto: ĉiuj ja scias, ke li estas la redaktoro de „Esperanto", de la centra organo de UEA kaj direktoro de la CO. Tamen, kiel poeto ĝis la apero de tiu ĉi volumeto li estis malpli konata: liajn poemojn oni renkontas malofte sur la paĝoj de niaj ĉefaj revuoj. En *Memkritiko* la aŭtoro prezentas al ni zorge selektitan kolekton el sia ĝisnuna verkaro: en pluraj, pli frue jam aperintaj poemoj ŝanĝoj, plibonigoj atestas pri la arta disciplino de la aŭtoro.

La recenzo ne akceptis liajn poemojn kun la tradicia indiferento: la plej multajn recenzistojn ŝokis la esprimmaniero kaj metriko, tute novaj en nia literaturo. Multo malbona estis skribita pri tiu ĉi poemaro — eĉ sur la paĝoj de prestiĝaj revuoj — sed neniu recenzisto (esceptoj maloftas) faris la plej etan klopodon kapti la ondolongon de la aŭtoro.

La plej karakteriza trajto de la volumeto estas la strebo al koncizo. Sadler konas la arton diri multe per malmulta parolo: tio kompreneble ofte kaŭzas densecon, kiu faras lian poezion malfacile digestebla. Tamen, la rezulto valoras la penon: penetrinte tra la komplika lingvovesto, oni ĉiam trovas adekvatan al la pezo de la formo kernan penson. Cetere, mem la trapenetro de la lingva vesto alportas al la leganto altgradan intelektan ĝuon. (Eble anstataŭ *trapenetro* estus pli taŭga la vorto *disfaldo*, ja la plurdimensieco de lia poezia lingvo estas komparebla al la plurtavola histfoliaro de la cepo.)

La baza tono de la poemaro estas speco de seniluzia amaro, foje-foje leviĝanta ĝis ironia skeptikismo. Sadler klare vidas la ĉefajn problemojn de la nuno, kaj lia trompiĝo en la tradicia kulturo kaj en la etiko de la „civilizita" mondo lin kondukis al tia decida neado:

> Ĉu min ekzaltu tiel
> uzurpo kaj kutimo? (p. 11.)

Tiu trompiĝo — kaj verŝajne ni ne rajtas preteratenti ĉi tie ankaŭ la influon de la hinda edzino — kaŭzis lian turniĝon al orientaj ideoj. En la *Elegio jarfina III.* li metas la Budhisman koncepton de kontemplado super la amon:

> ĉar kisoj ne kuracos la brulon
> de siroko.

La sama kaŭzo motivas ankaŭ la Maŭ Zedong-moton sur la titolpaĝo, kaj ne lastvice la ĉinan devenon de la titolo.

La aŭtoro paŝis sur misvojon, kiam li serĉas respondon al siaj demandoj en orientaj ideoj, tamen, lia „orientemo" ne estas simple atribuebla al la filozofia modo reganta en la evoluintaj kapitalistaj landoj. Sadler lanĉas en siaj poemoj tre vivan problemon, la *fremdiĝon*, el la vidpunkto de la individuo. Plejparte li ne respondas, nur demandas — tio estas senduba manko — sed liaj demandoj estas esencaj, kaj realiĝas en tre alta arta nivelo.

Lia tekniko kaj poezia lingvo ŝokis la ortodoksulojn, sed kion fari, ili ja estas ŝokiĝemaj. La poemaro de Sadler certe ne estas ripoziga legaĵo, ĝi ne respondas al la kriterioj, kiujn starigas por la literaturo multaj legantoj. Oni memoru: antaŭ dek sep jaroj ankaŭ *La infana raso* de William Auld kaŭzis ŝokon, sed sufiĉis jardeko kaj ĝi fariĝis klasikaĵo. Ŝancon ne malmultan havas por tio ankaŭ *Memkritiko*.

Vilmos Benczik

Felix WOOLF: English Phrases and Expressions in Eo. Cardiff, Ontario, Kanado; 100 p. 1969.

Scivole ni malfermis la libreton, kiu estis kompilita por montri al la anglalingvaj esperantistoj, kiel oni traduku iliajn esprimojn kaj idiotismojn. La kolektaĵo entenas kvinmil esprimojn ordigitajn alfabete.

La verkisto ĉe la traduko — tre ĝuste — klopodis parigi la anglajn kaj zamenhofajn esprimojn ĉefe laŭbaze de Plena Vortaro. Kiam mankis konvena ekvivalento, F. Woolf elektis simplan solvon, tradukante laŭsence la frazon. Kvankam pro tio ofte suferis la etoso, perdis la aromo de la diraĵo, sed li sukcesis eviti ĉiun malkomprenon aŭ miskomprenon. Tiamaniere estas tradukita ekzemple:

Drop in = pasante neatendite viziti
Lightfingered = ŝtelema
Lipservice = malsincera diraĵo

Feliĉe harmonias la anglaj esprimoj, kiuj estas geedzigitaj kun zamenhofaj proverboj. Ekzemple:

Mountain out of a molehill = fari el muso elefanton
Nothing succeeds like success = venas profito, venas merito
Nobody is perfect = neniu sanktulo estas sen makulo

Por ĉiu lingvo, en kiu superabundas, kvazaŭ svarmas la idiotismoj — kiel ankaŭ en la angla — tiaspeca kompilaĵo estas ne nur utila, sed oni povas diri, ke ĝi estas rekte nemalhavebla. Kaj ĉi-rilate eble ni povas diskuti la kolektitan materialon. Ankaŭ la antaŭparolo de la libreto emfazas, ke inter la esprimoj troviĝas multaj, kiujn eĉ denaskaj anglalingvanoj ne komprenas, ĉar tiuj ne estas uzataj en ĉiuj terenoj, kie la angla estas la oficiala lingvo. Ĉu ne estus pli taŭge elekti la plej konatajn idiotismojn, por ke el la libro povu ĉerpi pli vasta publiko? La kompilaĵo samtempe bone demonstras la dissplitiĝon de la angla lingvo, la multsignifecon de grandnombraj vortoj kaj konstantiĝintaj vortrilatoj.

Bonega papero, unuaranga tipografio, malmulte da preseraroj karakterizas la eksteraĵon de la broŝurita libreto.

Kiel mem la verkisto, ankaŭ ni observas tiun ĉi eldonaĵon kiel la unuan el la vico, atendante la pluajn, pli kompleksajn volumojn.

Aparte ni varmege salutas la libreton kaj ties aŭtoron el Budapeŝto, kie ĝuste nun estas naskata simila kompilaĵo: hungara-Esperanta frazeologio, tiel nomata „Domfabriko".

Ada Csiszár

J. Fh. R. SCHREUDER
kaj A, DIATLOWICKI-TOBI:
Geriatrio Kaj la ĝenerala Zorgo pri gemultjaruloj Tr. F. F. Faulhaber.
Eldono de FLE. 44 p.

Interesa kaj aktuala temo. Interesa, ĉar la san-problemojn de la multjaruloj ĝi pritraktas el tiaj vidpunktoj, kiuj ne estas vaste disvastiĝintaj, aktuala, ĉar la nombro de la multjaruloj ĉiam kreskas en la moderna socio. La aŭtoroj de la libro laboras en la sekcio por Geriatrio kaj Reaktivigo de la Ĝenerala Malsanulejo „Zonnestraal" (Sunradio) en Hilversum, Nederlando. La leganto multon ekscias pri la sanstato-ŝanĝiĝoj de la maljunuloj, pri ties kaŭzoj kaj pri la sanig-eblaĵoj. Nur kunsenti mi povas kun jena citaĵo el la libro: „Se tiu ĉi publikigaĵo havos kiel sekvon, ke nombro da homoj ne plu rigardos la maljunecon kiel kronikan malsanon, sed kiel normalan periodon de la vivo, kaj ke la maljuna homo estas same plenvalora individuo kiel la juna, ĝi tamen estos atinginta sian celon pli ol bone."

La tradukinto, F.F. Faulhaber, kiu estis flegata en la malsanulejo, per sia nefacila traduklaboro pruvis, ke la kuracmetodo de la malsanulejo helpis plibonigi lian sanstaton.

L. T.

ESPERANTO-SEMAJNOJ EN HUNGARIO



Ĉefaj vicoj de nia enigmo koncernas programojn de Esperanto-Semajnoj aranĝotaj en julio de 1972. Sendu al ni la solvon de: 1., 26., 43., 45. horizontalaj, kaj 1., 10., 32. vertikalaj. Inter solvintoj ni lotumos premiojn.

Horizontalaj vicoj: 1. Naskiĝurbo de J. Baghy, urbo de Hungara Esperanto-Muzeo; 6. Kunlaboranto de nia revuo, prezentiĝis per poemoj, tradukaĵoj. Nuntempe verkas eseojn; 11. OU; 12. Denove ekmontriĝi; 14. Internacia signo de sovetaj automobiloj; 15. Vasta etendaĵo de sala akvo; 17. Palpil' de homoj; 18. Hungara astronomo, sur la Luno oni nomis pri li krateron (.... 1720—1792.); 20. Peni ne renkonti iun; 22. Reen: parto de homa korpo; 23. Ronda konstruaĵ' kun kupolo; 25. Akceptu entuziasme; *26. Hungara urbo, loko de arangaĵo nomata sub 1. vertikala;* 28. Prepozicio; 30. Kunlaboranto de HV, lingvisto,leksikografo (en la lasta kvadrato staras komenclitero de baptonomo); 32. Insulo en la golfo de Marseille, malliberejo de Monte-Christo; 33. Aŭdebla aervibrado; 35. KDP; 36. Efektive; 38. Prepozicio; 41. Konsenta interjekcio; 42. Prepozicio; *43. Hungara urbo, loko de Tejo-kongreso (1966.), rezidejo de 3-a Teritoria Komitato de HEA; 45. Ripozloko proksime al antaŭe menciita urbo, loko de arangaĵo nomata sub 32. vertikala;* 46. NT; 47. Honorinda persono; 48. AI; 50. Litio kaj hidrogeno; 51. Muzika ritma melodi'; 52. Reen: interjekcio; 53. Azia lando (mankas la 0-finaĵo); 56. Akutangula (ekzemple fenestro, arkitekturo); 58. Kron' de papoj; 59. Demanda vorto; 61. Virnomo (mankas la o-finaĵo).

Vertikalaj vicoj: 1. Ĉijare oni jam la dekan, jubilean sesion aranĝas de ...; 2. Infanteriano de la franca afrika armeo; 3. Artefarita aŭ kurioza kaverno; 4. Identaj vokaloj; 5. Sinjorin; 6. Alvok' de dia favoro; 7. Sufikso, esprimanta elementon de tutaĵo; 8.... ismo: negativa doktrino, neanta ĉiun ajn kredon; 9. Mahometana doktrin', religi'; *10. Hungara ...:serio de aranĝaĵoj dum Esperanto-Semajnoj ...;* 13. Duop'; 16. Deviga religia ceremoniaro; 19. Du prepozicioj; 21. Germana virina nomo; 22. Sekvantan post la sepa; 24. Klasika majstro de pentrarto, flandro (1599—1641) (van ...); 25. Hungara vilaĝo, naskiĝloko de EMBA; 27. Germana pentristo, impresionisma (Uhde); 29. Optika instrument'; 30. Italia rivero; 31. AV; *32. Agrablaj tagoj, belega naturo, internacia atmosfero karakterizas tiun aranĝaĵon de 3-a Teritoria Komitato de HEA (mallongigo);* 34. Persona pronomo; 37. Sufikso montranta lokon difinitan por io; 39. Franca komponisto, muzikigis la Himnon Esperantan; 40. Materio de dentegoj de elefantoj; 43. ... metro: aparato por mezuri optikan rotacion; 44. Fama hungara esperantisto, iniciatanto de rekta metodo en instruo de E. (Andreo)(45. Multe diskutata gramatika finaĵo!; 49. DU tabelvortoj; 52. Radiko de verbo, difinita ĉe vico 20. horizontala; 54. Ĉiutaga manĝaĵ'; 55. Parul' de ino; 57. Reen: ŝati kare iun; 59. Konjunkcio; 60. Finaĵo de estonta tempo.

FERI

La ĝusta solvo de nia enigmo aperinta en HV 1971/3 tekstas:

„Mi por mia am' oferas vivoflamon.
Mi por la liber' oferas mian amon."

Libropremion gajnis: Jürgen Hamann, 705 Leipzig, Püchaver str. 3. el GDR; Dro J. Kondor, 684 Lampertheim, Ernst Ludwig str. 30. el GFR; Kovács Gusztávné, Budapest, X., Szárnyas u. 20/c. fsz. 2. el Hungario; Adam Zabek, Katowice I. Poštkesto 1230, el Polando.

Ĝustan solvon ensendis ankoraŭ: F-ino N. Hanson, s-ro Alec Venture el Anglujo; Otto Kuttelwascher el Aŭstrio; Aleŝ Bednarik, Miroslav Hromas, Zdanek Hostomsky, Zadanek Hrŝel el Ĉeĥoslovakio; Ilse Neumann, Ludwig Schödl, Ernst Muthshall, s-ino Linde Knöschke, Rainer Fischer, dro Karl Schulze el GDR; Erika Bardocz, Ferenc Bartók, József Bíró, István Csalár, d-ro István Csató, Pál Csujna, György Csüllög, Péter Erdős, Izabella Hidas, Tivadar Kereszthegyi, István Kovács, József Lőrinczi, Károly Magyari, István Molnár, Teréz Szabó, Károly Juhász, Antal Szakáll el Hungario; Esperanto Klubo, Myslowice, Anton Madej kaj Jerzy Banacki el Polando; Aleksandr Vajsberg, Viktoro Aroloviĉ, Rein Kiviaru. N. M. Fedotov el Sovetunio, Hugo Löfgwen el Svedio.

Ĉu plaĉas al vi HUNGARA VIVO?

Surprizu viajn amikojn: abonu por ili!

Korespondi deziras

HUNGARA VIVO

Lekutytel Rivijai, USSR, Litovio 235051, Kédainiu, Raj. Dotnuva-Akademijo Vainati?kiu, 3—5. 18-jara filatelisto, kiu interesiĝas pri la muziko, ĵurnalistiko.

Mieczyslaw Porowski, Pollando, jara oficisto interesiĝas pri sporto, Opole, ul. Dambonia 133 m. 15. 25-turismo, muziko moderna, kino, teatro ktp.

17-jaraj gejunuloj pri ĉiuj temoj. D. H. Amikeco-Esperanto Liceum Ekonomicznym Gdansk — 1 Seredynskiego.

László Ináncsi, Kecskemét, III., Mária u. 12. Komencanta esperantisto k. d. kun francoj, germanoj, pollandaj aŭ bulgaraj korespondantoj.

Andrzej Pawelczky, 25 jara teknikisto. Interesiĝo: numismatiko, turistiko, muziko, motorizo. Povas ŝanĝi: vidkartojn, librojn. Piotrków tryb. al. B. Bieruta 3/7 Pollando.

Junaj gekomencantoj deziras korespondi kun geamikoj de la tuta mondo. Esperanto Rondo Skierniewice str. Sienkiewica 1. Kulturdomo de fervojistoj Pollando.

Marko Wagiel Sucha Beskidzka ul. Miczkiewicza 116/31. woj. Kraków Pollando. — Pri turismo, sporto, filatelo. (20 jara)

Jadwiga Dzialakiewicz, Kielce ul. Batorego 32 Pollando. 25 jara oficistino. Turismo, muziko, Esp. literaturo.

Margareta Szastak, Sarnów. ul. Wiejska 54. woj. Katowice, Pollando. 17 jara lernantino. Turismo, p. m. gramofondiskoj, aliaj temoj.

Jerzy Posluszny (25-jara instruisto) Wroclaw 17 p. k. 1629 Pollando, k. d. kun tuta mondo E-e kaj interŝanĝi b. kartojn k. E-aĵojn.

Regina Mazeikaiti, 19-jara, B. k., p. m. k. aliaj temoj. USSR, Litovio, str. Taikos pr. 13—52. Klaipeda — 2.

Zbigniew Binienda teknika studento k. d. kun gejunuloj. Bydgoszcz, ul. Huzarska 6. Pollando.

Aleksandro Adles, 17 jara, k. d. samjaraĝa junulino. Lingvistiko, landkono, beletro. Li dezirus interŝanĝi p. kartojn, librojn. BYtom, ul. Chelmonskiego 14 m. 5. Pollando.

Maria Sajewicz (20-jara instruistino) Nowojowice 17 Pta Wegry Pow Vroclavo Pollando. — Pri diversaj problemoj.

Danuto Jedlowska (23 jara instruistino) Krinki ul. Iokólska 9. pow. Jokótka woj. Bialystok. Pollando.

Irena Król (?) — 21-jara fraŭlino. Glivice str. Danapowska 17. Pollando.

Aristarhov K. Ju. USSR. Leningrad, 191040, P. k., alumetuj-etikedoj, gramofondiskoj ktp.

Blaso Telek, Csemő, I. 52. Hungario. — 20-jara knabo. Arto, literaturo, pentrarto, ekskurso.

Mazurek Wiestaw, Izyce p-ta Bychaska pow Pychaska, woj Dublin. 18-jara lernanto. Muziko, kanto, diskoj ktp.

Preyer Kornel Naleczów, Pollando. 24-jara masaĝisto. Moderna pentroarto, muziko, ktp.

Milĉo Petkov, Bulgario, Burgas k-c Tolbuĥin, bl. No. 70. ap. No. 42. Pri ĉiu temo.

Kvaronjara revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Budapest VIII., Kenyérmező utca 6.

1972. XII.-a jaro, 1-a numero

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro:
dr-o Jozefo Mátéffy
Lingva revizio: *K. Kalocsay*
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoraro:
d-ro Pál Avar, d-ro István Bácskai, Szilárd Bálint, Vilmos Benczik, Ada Csíszár, Ervin Fenyvesi, Zsolt Gyarmathy, Lajos Lesznai, Alfonso Pechan, Aurél Ponori Thewrek, Mária Szabó, d-ro István Szerdahelyi, Tibor Újlaky-Nagy, Gábor Vigh

Ĉefkunlaborantoj:
D-ro Géza Bárczi, Paŭlo Balkányi, Károly Jobbágy, Mór Korach, Ludoviko Kökény, Sándor Szathmári, Lajos Tárkony

La redakta komitato la unuan ĵaŭdon de ĉiu monato posttagmeze de la tria ĝis la kvina horo havas akceptotagon. (Bp. VIII., Kenyérmező utca 6.)

Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepreno, Budapest, VII., Rákóczi út 54.
Telefono: 224-819

Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K. H. I., Budapest, V., József nádor tér 1.) senpere, aŭ per ĉekenpagilo, por individuaj abonantoj la ĉeknumero estas 61 280, por neindividuaj 61 066.

La abono estas por jaro Ft 32,—, al eksterlando krome Ft 6.40 poŝtelspezo.

72.7569 Békés megyei Nyomdaipari Vállalat, Gyula
Indexszám: 25.377

HUNGARHOTELS

INFORMACIO

BUDAPEŜTO
V. PETŐFI SÁNDOR U. 16.
Tel.: 383-117, 180-642
Telex: 22-4923



ORGANIZADO KAJ ARANĜADO DE

ĉambromendo — monŝanĝo — aranĝaĵoj — kongresoj — koktelpartioj — tablorezervigo — bankedoj — presioakceptoj — vingustumadoj — hajduko-(betyár)-festeno — kelvizitadoj — nuptofesteno — kavalkad-prezentadoj
sur tuta teritorio de Hungario.

MEDICOR MEDICOR

MEDICOR BUDAPEST

Jonizatoro por aŭtomobilo

Tip.: Bion-78

por produkti negativajn jonojn.

Uzata en aŭtomobiloj ĝi malpliigas la lacecon, la reakciotempon, havas trankviligan efikon, pliigas la sekurecon de stirado. Per helpo de adhera disko ĝi estas fiksebla sur la kontraŭventa ŝirmglaco de la aŭtomobilo. Ĝia nutrado okazas el akumulatoro.

Nutra tensio:	6 + 3; 12 + 3 V
Joniza povo:	2×10^9 jono/cm^3/sek
Dimensioj:	∅ 80—85 mm
Pezo:	0,2 kg